HUNGARA VIVO

3
1980
11,– Ft



KOMUNIKTEKNIKAJ APARATOJ, MAŜINOJ POR MASTRUMADO, LUMIGAJ ARTIKLOJ POR LOĜEJOJ EN LA FAKVENDEJOJ ELEKTRON

Magazeno ELEKTRON

1067 Budapest VI. Lenin krt. 77.
Telefono: 324-399, 129-682

Magazeno de Elementoj ELEKTRON

1065 Budapest VI. Bajcsy-Zsilinszky u. 45.
Telefono: 327–191, 321–991

Ekspozicia Vendejo HAJDU-ELEKTRON

1065 Budapest VI. Bajcsy-Zsilinszky u. 49.
Telefono: 118–109

Ekspozicia Vendejo LEHEL-ELEKTRON

1051 Budapest V. Bajcsy-Zsilinszky u. 18.
Telefono: 324–164

Elektroakustika Fakvendejo ECHO-ELEKTRON

1065 Budapest VI. Bajcsy-Zsilinszky u. 19/a
Telefono: 117–698

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H—1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193, H—1368
Aperas dumonate
XXa jaro, 1980 n-ro 3
(91)

ENHAVO

Bálint, Sz. Ĉu vi ŝatas hungaran salamon? 82
László, I.: El la gastlibro de Hungario 83
L. I.: Gyula Germanus mortis ... 84
Knichal, O.: Sociala turismo per la hungaraj sindikatoj 84
Benczik, V.: Esperantisto el la infero de Pol Pot 85
De Kock, E.: Haladzo el Kamboĝo 85
Kaffka, M.: Maja pluvego (L. *Mauksinszky)* 86
Hikmet, N.: La nuboj ne mortigu homon (N. *Hjusejinov)* 87
D-ro Rátkai, Á.: Verda estas nia plago 88
Golden, B.: Memorigo pri pioniraj hungaraj volapukistoj ... 89
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo (VHZs) 15. 90
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo (P. A. *Rados)* 92
Novaĵoj 94
Váci, M.: De tiam (V. *Benczik)* 95
Mason, D. L. Patro mia 96
Gergely, M.: Attila Kiss 99
Farkas—Tatár, É.: Panoramo ... 100
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj ... 103
D-ro László, F.: Budapeŝto, urbo de banejoj (E. *Fenyvesi)* 104
Eminescu, M. Sola sopir' de l'sin' (K. *Kalocsay)*, Deziron havas mi (J. *Petrin)* 110
V. B. Esperanta libroprodukto dum 1979 110
Originala poezio 111
Esperanto-programoj en Hungario dum 1980 112
Novaĵoj 112
Gaja paĝo 113
Bálint, Sz.: La kaptilo 114
Mihalkov, G.: Infana pilko 115
Recenzoj de W. *Auld*, V. *Benczik*, *M. Givoje*, I. *Király* 116
Leterkesto 120

Sur la kovrílo:
Florkarnavalo
en Debrecen

Pri unu afero...

mi estas certa: nome, ke tiu ĉi numero atingos la legantojn pli frue, ol 3/1979, kiu aperis meze de oktobro. La diferenco inter la du aperdatoj estos signifa, kaj la jenajn vortojn oni legos jam en somero . . .

Kion do atendi de tiu ĉi numero? Jam sur la sekva paĝo aperas io senso-tikla: tamen, temas nur pri la gusto-senso; ni presigis tie artikolon pri viandaĵoj, interalie pri la fama hungara salamo. Hungaroj ĉiam ŝatas bone manĝi, sed ke nia lando tamen ne estas nura „manĝejo", montras la citaĵoj de *El la gastlibro de Hungario*, en kiu konataj artistoj rememoras entuziasme pri sia restado ĉe ni.

Bernard Golden artikolas pri Volapük, liverante interesajn indikojn pri la agado de volapükistoj en Hungario. *Verda estas nia plago . . .* — asertas Árpád Rátkai, per kiu eldiro verŝajne li elvokos multajn reagojn, ĉar li kritikas la uzadon de simboloj en la Esperanto-movado, precipe la verdan koloron de nia flago . . .

Mi ne povas ne atentigi ĉi tie pri la paĝo 85, sur kiu aperas artikolo pri Kamboĝa esperantisto Long Visalo, pasiginta tri jarojn kaj duonon en la infero de Pol Pot. Poemo de Edwin de Kock dolore harmonias kun tiu artikolo.

Literaturaĵoj abundas en tiu ĉi numero. Aperas eĉ du noveloj: *Maja pluvego* de la jubileanta Margit Kaffka majstre prezentas tre interesan scenon, dum la originale verkita *Patro mia* de la usonano Daniel L. Mason priskribas tragedion de maljunulo. Poemtradukoj aperas ne nur el la hungara, sed ankaŭ el la rumana kaj turka lingvoj. Tamen, ĉi tie mi mencias aparte la majstran poemegon de la hungaro Mihály Váci, mortinta antaŭ dek jaroj. Per *De tiam* li revuas la mondajn eventojn de la epoko post la dua mondmilito. Tiu poemo verkiĝis fine de la sesdekaj jaroj, sed tute bone povus verkiĝi ankaŭ nun . . . Kaj kiel preskaŭ en ĉiuj numeroj, ankaŭ nun aperas fasko da poemoj originale verkitaj en Esperanto.

Kompreneble ne mankas ankaŭ niaj konstantaj rubrikoj: *Panoramo, Revuo de revuoj, Gaja paĝo, Paĝo de komencantoj* ktp. . . . kaj troviĝas ankaŭ la regula longa artikolo pri hidrologiaj problemoj, kiu cetere havas ne malmultajn adeptojn inter la legantaro.

La Redakcio esperas, ke niaj fidelaj korespondantoj trovos tempeton ankaŭ dum la somero surpaperigi siajn impresojn pri la artikoloj kaj literaturajoj en HV, eĉ se nia modesta stabo ne ĉiam trovas tempon por respondi al ĉiuj. Kredu al ni, ke ĉiuj leteroj estas nepre legitaj de pluraj redakcianoj, kaj en ĉiu redakcia kunveno ni pritraktas la opiniesprimojn de la legantoj. Ja ni supozas, ke la plej bona respondo al kritika letero estas, se oni forigas la kritikitaĵon . . .

Ĉu vi ŝatas hungaran salamon?



Pretiĝas la ŝinko por eksporto en la viandofabriko de Pápa

Viandoproduktado en Hungario

Hungario ĉiam estis fama pri siaj manĝaĵoj; multaj turistoj venas al ni interalie pro la deziro provi la renomajn produktojn de la hungara kuirarto. Sed por havi bongustajn manĝojn, oni bezonas ankaŭ bonajn „krudmaterialojn", antaŭ ĉio viandon.

Dum sia historio Hungario ĉiam eksportis viandon, tamen, en nia historio troviĝis periodoj, kiam niaj viandovendejoj oscedis malplenaj. Nuntempe io tia ne okazas: dommastrinoj ĝenerale grumblas nur pri la prezoj, kiuj lastatempe grave altiĝis. Tamen, ili eĉ nuntempe montriĝas malpli altaj — ankaŭ konsiderante la salajronivelon — ol en okcidentaj landoj. La porkapa jara produktado de viando en Hungario estas preskaŭ 200 kg, kaj la konsumado por persono superas 75 kilogramojn.

Grava evoluo dum la lasta jardeko

La hungara viandoproduktado grave evoluis dum la lastaj dek jaroj. Aparte kreskis la bredado de porkoj kaj kortbirdoj. La disvolviĝon akcelis la fakto, ke la kvanto de furaĝo, uzata por la produktado de unu kilogramo da viando, malpliiĝis je 30—35%, nome anstataŭ la antaŭaj 4,8—5,5 kg, nun necesas 3,2—3,5 kg. (Tiu malpliiĝo tamen ne estas fakto pure pozitiva, ĉar ĝi inkluzivas ankaŭ neglekton al enlandaj furaĝoj, kaj utiligon nenecese vastan de proteinaj furaĝoj, importitaj ĉefe el Usono kaj Peruo.) Jen kompara tabelo pri la kresko de produktado:

	1979		*1970*	
	1000 tunoj	*%*	*1000 tunoj*	*%*
Bovoj	*324*	*24*	*326*	*17*
Ŝafoj	*37*	*3*	*42*	*2*
Porkoj	*691*	*51*	*1118*	*58*
Kortbirdoj	*281*	*21*	*416*	*22*
Fiŝoj	*18*	*1*	*23*	*1*
Sume:	*1351*	*100*	*1925*	*100*

Fundamentan signifon en la hungara agrikulturo havas la agrikulturaj kooperativoj kaj ŝtataj bienoj. Tamen, en la brutobredado elstaran rolon havas la etproduktantoj kaj la hejma brutaro de la membroj de agrikulturaj kooperativoj. Tio rilatas precipe porkojn, kies viando estas la plej ŝatata de hungaroj. La suba tabelo montras la procentan proporcion de brut-etato en privata posedaĵo, en kelkaj socialismaj landoj:

Landoj	*Bovoj*	*Porkoj*	*Ŝafoj*
Bulgario	*31,9*	*26*	*38,1*
Ĉeĥoslovakio	*7,9*	*9,4*	*33,6*
Hungario	*34,1*	*50,7*	*11,5*
Rumanio	*49,4*	*33,1*	*43,9*
Sovetio	*31,8*	*18,6*	*17,5*

Raciigoj kaj subvencioj

La hungara ŝtato efike apogas la brutbredadon en ĉiuj tri sekcioj de produktado: ŝtata, kooperativa kaj privata. La apogo aperas ankaŭ en formo de subvencioj, sed grava premiso por tio estas ŝpara utiligo de furaĝoj, kaj pli bona konformiĝo al la pretendoj de la enlanda kaj eksterlanda merkato. Iam la hungaraj vilaĝanoj nutris porkojn ĝis tiuj antingis 180—200 kg. Tio havis duoblan malavantaĝon. Ĉe tiu korpopezo porkoj fariĝis tre grasaj, kaj krome, la kreskigo de korpopezo inter 100—200 kg kostas preskaŭ duoble pli, ol ĝis 100 kg. Tial la ŝtato aĉetis de la produktantoj nur porkojn kun pezo ĝis 120 kg. Lastatempe oni malaltigis eĉ tiun ciferon, kaj plej bonan prezon oni pagas por porkoj de 95—115 kg.

Problemoj pri bovoj

Tiun subtitolon oni komprenu ne nur metafore — pri bovoj vere ni havas problemojn, precipe pro la importlimigoj en la landoj de la Komuna Merkato. Pro tio la produktado de bovoviando en Hungario dum la lasta tempo ne evoluis signife.

Male estas pri kortbirdoj, kies produktado kreskis je 50%. La plej elstara „produktejo" estas granda „kortbirda kombinato" en Bábolna, kiu liveras ne nur kokidviandon al multaj landoj de la terglobo, sed ankaŭ etajn kokidetojn por bredistoj, eĉ lastatempe kompletajn „kortbird-fabrikojn".

Malgraŭ la fama hungara fiŝsupo, fiŝado ne estas signifa en nia lando. Hungario ne havas maron, kaj hungoraj ne aparte ŝatas fiŝojn. Niaj riveroj estas mallongaj kaj ne aparte abundaj je fiŝoj; la lagoj Balatono kaj Velencei servas ĉefe por fiŝhokistoj. Nia modesta fiŝproduktado okazas plejparte en artefaritaj lagoj.

Kio okazas en Gyula — krom SEU?

La prilaborado de viando okazas en grandaj fabrikoj, kiuj troviĝas multloke en la lando. La plej signifaj estas tiuj de Szeged, Gyula, Miskolc, Pápa, Kaposvár. Krom ili ankaŭ multaj agrikulturaj kooperativoj prilaboras viandaĵojn, plejparte laŭ tradicia maniero, kaj pro tio iliaj produktaĵoj estas tre popularaj ĉe la hungara publiko. La hungara komerco vendas ĉ. 140 specojn de kolbasoj, salamoj, ŝinkoj, kolbasetoj, budenoj, fumitaj viandoj, ktp. La kvaliton difinas rigoraj ŝtataj normoj, kies plenumo ĉiam estas rigore kontrolata fare de la kompetentaj aŭtoritatoj.

La hungara viando-industrio prilaboras jare unu milionon kaj 200 mil tunojn da porkviando. Nur en la urbo Gyula — kiun urbon esperantistoj bone konas pro la ĉiujara Somera Esperanto-Universitato — oni buĉas 540 mil porkojn dum jaro. Krom kolbasoj kaj aliaj viandaĵoj oni produktas ankaŭ multajn konservaĵojn, kies signifa parto iras al aliaj landoj, ofte al aliaj kontinentoj. La fabrikoj estas specialigitaj: ekz. Szeged produktas la ĉie konatan hungaran salamon, Gyula specialajn spicitajn kolbasojn, Pápa kaj Kaposvár ŝinkokonservaĵojn, ĉefe por Usono.

Estontaj taskoj

La hungaran viandoproduktadon atendas jaroj ne facilaj. Ĝi devas plenumi trioblan taskon: certigi harmonian kaj abundan enlandan sortimenton, plenumon de eksportliveroj al socialismaj landoj, konforme al la interŝtataj kontraktoj, kaj signifan altigon de enspezoj sur la kapitalisma merkato. Tiu lasta tasko havas apartan gravecon por la re-ekvilibrigo de la komerca bilanco de nia lando.

Szilárd *Bálint*

El la gastlibro de Hungario

Nian landon vizitas ĉiu jare multaj milionoj da turistoj. Inter ili grandnombre troviĝas ankaŭ elstaraj figuroj de la internacia kultura vivo, kies opiniojn pri nia lando ni trovas aparte atentindaj, ja ili vojaĝas multe kaj havas bonan bazon objektive prijuĝi tion, kion ili spertas en Hungario. Jen, bukedo el tiaj opinioj:

JEVGENIJ **NESTERENKO,**

mondfama kantisto de la Akademia Granda Teatro en Moskvo:

„Budapeŝto estas la perlo de Danubo, kaj ankaŭ perlo inter la urboj, kie mi gastrolis. Tiu sento obsedis min la unuan fojon, kiam fakte mi povis vidi nenion el la urbo mem. Mi alvenis la tagon de mia debuto, kaj miaj akompanantoj tuj kunportis min al provo. Post la unua ario de la ĉiam ekscita debuto eksonis la aplaŭdo, kaj mi sentis veran simpation ĉe la spektantoj. Poste la aplaŭdo fariĝis ĉiam pli arda, ĝis la fino de la prezentado. Depost tiam mi venas al Budapeŝto, kvazaŭ mi venus hejmen . . .”

RAQUEL **WELCH,**



usona filmaktorino:

„Ĉi tiu estas mia dua vizito al Budapeŝto. Nun mi venis ĉi tien por partopreni en la filmado de la admirinda romano de Mark Twain: La almozulo kaj la reĝido. Mi estas la virina ĉefrolanto.

La unua vizito — eĉ se nur kelkhora — okazis por partopreni la naskiĝtagan akcepton de Elisabeth Taylor en la Hotelo Duna Intercontinental. Nun, pasigante semajnojn ĉi tie, kompreneble mi povas akiri pli riĉajn impresojn pri la homoj, pri la aspekto kaj la vivoritmo de la hungara ĉefurbo. Tagon post tago, revenante el la mondo de La almozulo kaj la reĝido en mian hotelon, mi konstatas, ke en Budapeŝto oni ne vidas almozulojn. Kvankam estas vere, ke mankas ankaŭ reĝidoj . . .”

LUIGI **ALVA,**

membro de la operdomoj „Metropolitain” en Novjorko, kaj „La Scala” en Milano:

„Mi vizitas Budapeŝton unuafoje. Multe mi jam aŭdis pri la legenda beleco de la hungara ĉefurbo, sed la realo superis mian imagon. La unua granda travivaĵo estas la unika situo de la urbo. En la Burgokvartalo estas mirindaj la bele rekonstruitaj malnovaj domoj, kiuj tamen bele harmonias kun la nun konstruitaj modernaĵoj. En la Budapeŝta Historia Muzeo mi vidis eksterordinare interesan urbohistorian ekspozicion. La urbo inspiris min vere tre efike, kaj vespere, en la Ŝtata Operdomo, jam en la unuaj momentoj mi sukcesis trovi kontakton kun la publiko. Mi forvojaĝos el Budapeŝto kun belegaj travivaĵoj en la memoro.”

NATHALIE **SARRAUTE,**

franca verkistino:

„Mi alvenis al Budapeŝto, kiel gasto de la Hungara PEN-Klubo. Do, kompreneble mi havis precipe literaturajn travivaĵojn. Mi renkontis kolegojn, tradukistojn, kritikistojn. Aparte forte impresis min la abundo de hungaraj librovendejoj, la literatura informiteco de la vendistoj kaj aĉetantoj. Surprizis min la granda nombro de literaturaj eldonaĵoj, la eldonkvantoj, la riĉa materialo de bibliotekoj, la erudicio de bibliotekistoj . . .”

GEORGE **CUKOR,**



usona filmreĝisoro:

„Kiel homo ĉiam dubema, mi ne tre kredas pri junigaj kuraciloj. Tamen, mi nun supozas esti sub la efiko de io tia. Kvankam mi naskiĝis kaj edukiĝis en Novjorko, hejme mi parolis hungare, ĉar mia familio estis hungardevena. Dum mia tuta vivo mi konfesis min usonano kaj hungaro samtempe. Tamen, ĝis nun mi vizitis Budapeŝton nur unufoje, en la tridekaj jaroj. Kvankam mi ne venis ĉi tien turisme, kun granda ĝojo mi revidas Budapeŝton, multe ŝanĝiĝintan, sed esence tamen la saman: sorĉan kaj belegan . . .”

Kompilis: István **László**

Gyula Germanus en la distinga verda turbano

Gyula Germanus mortis

Unu el la plej elstaraj figuroj de niaj „grandaj olduloj" foriris. Gyula Germanus, la fame konata orientalisto, universitata profesoro post plenumo de sia 95a jaro finis por ĉiam sian sciencan laboron dum la pasinta aŭtuno.

Prof. Germanus naskiĝis en jaro 1884 en Budapeŝto. Jam junaĝe li montris interesiĝon pri la orientaj lingvoj kaj pri la praa Azia filozofio. Li studis en la universitatoj de Budapeŝto, Konstantinoplo, Vieno kaj Lejpzigo. En 1907 oni promociis lin doktoro de la turka kaj araba lingvoj, literaturo kaj antikva historio en la filozofia fakultato de la tiama Scienca Universitato de Budapeŝto. Inter la jaroj 1908—1911 li faris esploran laboron en Londono ĉe la fama Brita Muzeo. Post lia reveno, ekde 1912 li fariĝis profesoro de la turka kaj araba lingvoj, krome tiu de la islama historio en la tiama Hungara Orienta Komerca Akademio. Intertempe li faris plurajn studvojaĝojn en Balkano kaj Turkio. De 1927 — pro la peto de Rabindranath Tagore — li organizis en Indio la islamologian fakultaton de la universitato bengala kaj gvidis ĝin dum jaroj.

Lia interesiĝo pri Egiptio kaj Arabujo eĉ pliiĝis kaj la jam konata scienculo denove fariĝis disĉiplo, en la miljara moskeo-lernejo A z h a r en Egiptio. Li partoprenis en la fama pilgrimado de la mahometanoj al Mekka. Sekve de liaj islamaj studoj kaj spertoj li verkis duvoluman verkon: A l l a h A k b a r. Tiu verko intertempe fariĝis mondfama. Ĝi estas samtempe memkonfeso, sumado de lia vivo kaj romantika rakontaĵo. Lian verkon oni eldonis en pluraj lingvoj kaj eldonoj.

Cetere tiuj vojaĝoj rezultigis turnopunkton en lia vivo. La mahometana medio kaj la jardekaj studoj kondukis lin al tiu konvinkiĝo, ke li povas fari sian sciencan laboradon aŭtentike kaj vere nur tiam, se li konas la Islamon ne nur el libroj. Pro tio dum unu el la vendredaj preĝadoj de la *Dŝama Masid* en Delhi, li anoncis, ke li aliĝas al la islama religio. De tiam li ricevis la nomon A b d u l K a r i m.

Krom lia grava scienca laborado, li partoprenis ankaŭ en la publika vivo de sia lando. Ĝis 1966 dum 8 jaroj li estis parlamenta deputito.

Abdul Karim nun eksilentis...

István **László**

SOCIALA TURISMO
per la hungaraj sindikatoj

Antonio Oliveira el Portugalio vizitis pasintjare Hungarion jam duafoje. En siaj rememoroj li sendube pli ofte revenadas al tiu ĉi lando, kie oni savis lian vivon dum malbonŝanca kolapso. La hungaraj sindikatoj nome aĉetis tre multekostan aparaton, kiu al kormalsanulo helpas transvivi, daŭre funkciigante lian koron. A. Oliveira estis tiam partoprenanto de la ekskurso organizita de Buroo por la sociala turismo de la hungara Centra Sindikata Konsilantaro (SZOT). Tiu ĉi institucio nun plenumis dek kvin jarojn de sia agado kaj sur la hungara teritorio bonvenigis la centmilan gaston el okcidento. Pri ĝia misio ni parolis kun la vicdirektoro László *Jicsinszky:*

La fako — analoga laborejo agadas ĉe la sovetiaj sindikatoj — havas kontaktojn kun turismaj burooj en tridek unu okcidentaj landoj, plejparte eŭropaj, kiujn administras sindikatoj aŭ maldekstraj politikaj partioj. Jare ĝi akceptas en grupoj dek du ĝis dek tri mil turistojn. Ili estas esence aktivuloj de la membro-organizoj de Internacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj aŭ de Ĝenerala Laborkonfederacio. Ili profitas la eblecon elekti kaj viziti dum dekkvartaga restado uzinojn, agrikulturajn kooperativojn, renkontiĝi kun siaj kolegoj en sindikataj unuiĝoj, propraokule sperti la ĉiutagan realon de la socialisma lando. Kaj ilia interesiĝo estas ofte nekutima — iuj grupoj mendas eĉ naŭ vizitojn al diversaj lokoj.

Unikan servon oni proponas al sindikatanoj okaze de la 1-a de Majo (temas ne pri la oficialaj delegitoj — O. K.) kaj de la jarfino. Italaj gastoj, da kiuj venas ĉirkaŭ kvincent, aranĝas tiam — en la unua januara tago — solidarecan mitingon en Budapeŝto.

Oni ne povas neglekti la financan aspekton de la aranĝoj. Por la gastoj estas multe pli avantaĝe veturi pere de SZOT ol aliĝi ĉe turisma agentejo. Aliflanke por la valuto tiamaniere gajnita — la ekskursoj ne okazas interŝanĝe — la hungaraj laboruloj povas ekskursi al okcidentaj landoj.

Oni preferas vojaĝi al maro — en Greklandon, Italion, Jugoslavion; interŝanĝe sole al Portugalio, utiligante tre avantaĝan manieron de transporto, tiel ke popersona budĝeto faras nur 7700 forintojn, kvankam la plejparton de tiu ĉi sumo kompensas al la ekskursantoj ilia entrepreno kiel repagon pro la eminentaj laborrezultoj. Ĉirkaŭ 2500 hungaraj sindikatanoj tiel veturas ĉiujare, sed ili pasigas eksterlande relative pli da horoj ol la eksterlandanoj en Hungario. Ankaŭ ilia programo inkluzivas renkontiĝojn kun laboristoj kaj sindikataj reprezentantoj kaj oni povis konvinkiĝi, ke tiaj renkontiĝoj rezultigas instruplenan lecionon pri la viv- kaj laborkondiĉoj en la okcidentaj landoj.

Kvankam la agadkampo de la buroo estas ĉefe okcidente, ĝi kunlaboras ankaŭ kun partneraj organizoj en la socialismaj landoj; tiurilate bonan sperton ĝi faris ekzemple kun la Slovakia Tatratour. La pordon jam „frapas" Olimpikoj en Moskvo kaj ĝi estis komisiita organizi programon por la 1800-membra karavano de elstaraj laborantoj kaj sindikataj aktivuloj (inkluzive de naŭdeko da anoj de Hungara Esperanto-Asocio). Ankaŭ el tio, ke la sindikatoj pagas al ili duonon de kostoj, oni povas vidi, ke temas pri la sociala turismo.

Kiel resumi mallonge la forpasintajn dek kvin jarojn? La buroo neniam eldonadis propagandfoliojn, tamen pri ties aranĝoj oni skribas en la okcidenta gazetaro. En 1965 ĝi tenis kontakton kun sep oficejoj kaj enloĝigis 700 gastojn, hodiaŭ dekkvaroble pli — tiel akirante multe da amikoj, kaj al ĝia ekonomio valorajn valutojn.

O. *Knichal*

Esperantisto el la infero de Pol Pot

Antaŭ kelkaj jaroj aperis en la internacia Esperanto-gazetaro pluraj informoj pri tio, ke en la Budapeŝta TESCO-Kolegio studas Esperanton grupo da gejunuloj el la Tria Mondo. Tiam laborante kiel edukisto de tiu kolegio, mi havis dum tri jaroj rektajn kontaktojn kun tiu internacia medio.

Aparte intime mi amikiĝis kun tri junuloj el Kamboĝo, kiuj faris post-universitatan studadon. Kiam venis la jaro 1975, Kamboĝo liberiĝis, kaj ili forlasis Hungarion, la disiĝo estis malfacila por ni ĉiuj. Hean Hok Sreang kaj Bun Chamroeun Sok (cetere aŭtoroj de la konata *Esperanta-Kamboĝa Vortaro),* konsternitaj de la teruraj informoj pri la agado de la „ruĝaj kmeroj" de Pol Pot, decidis resti en Parizo, sed la tria junulo, Long Visalo decidis reiri hejmen: „Mi estis dum dek jaroj for de mia lando, tiom sufiĉis, okazu io ajn, mi reiros" — li diris firme. Kaj li faris tiel.

La teruraj novaĵoj venis inunde el Kamboĝo. Leteroj ne povis eniri la landon. Se en amika societo prononciĝis la nomo de Visalo, ni ĉiuj eksilentis. Ni estis certaj, ke li ne plu vivas. Kiel ja povus transvivi la inferon de Pol Pot tiu knabo malalta, korpe malfortika, kaj ĉiam diskutpreta, kritikema, malkapabla senvorte toleri eĉ la plej etan maljustaĵon ...

Kaj komence de januaro ĉijare dum iu vespero sonoris la telefono en mia loĝejo. Mi aŭdis viran voĉon, kiu en neperfekta hungara lingvo, poste en Esperanto demandis min: „Ĉu vi rekonas min?" Ĉar la respondo estis nea, li diris sian nomon. Estis Visalo, kiu alvenis en Budapeŝto kiel membro de registara delegitaro el Kamboĝo ...

Post duonhoro ni jam povis ĉirkaŭbraki unu la alian en la halo de lia hotelo. La kvar jaroj, kiujn li pasigis en la infero, ne pasis senspure: li maldikiĝis, lia vizaĝo sombriĝis, kaj la pli frue vigle vibraj lumoj en liaj okuloj kvazaŭ laciĝis ...

Mi ne reskribas ĉi tie lian rakonton pri la suferoj inter 1975 kaj 1979. Ja tiu ĉi rakonto esence similas al tiuj, kiuj aperis en la monda gazetaro. Mi tamen ne povis aŭskulti lin kun la objektiva kunsentemo, kiun ĵurnalistoj ordinare havas al la multe suferintaj intervjuitoj. Ja tiu homo ne estis unu el la milionoj de la suferintaj kamboĝanoj, sed mia intima amiko, *antaŭ ol* li eniris la koncentrejojn de la „kolektivisma socialismo", amiko, kun kiu min ligis multaj fortaj fadenoj, interalie ankaŭ la amo al la Internacia Lingvo ...

Kiel li transvivis, kiam almenaŭ tri milionoj da homoj estis murditaj far la nigraĉemizaj frenezuloj? Hazarde. Jes, hazarde, ĉar ĉiuj tagoj povus alporti la morton por li, kiel por tri milionoj da aliaj homoj la morto alvenis ...

Nun li estas estro de departemento en la Ministerio pri Eksteraj Aferoj de Kamboĝo. Lia monatsalajro estas *13 kilogramoj da rizo* ... Liaj vestaĵoj ... nu, ili ne pensigas pri ministeria ĉefoficisto, kaj ili ne estas sufiĉe dikaj en la frosto de la januara Budapeŝto. Li malvarmumis, havas febron, sed amare ŝercas: „Ĉu vi pensas, ke post la infero de Pol Pot io povas malutili al mi? Transvivinte tion, mi mortos neniam ..."

Ĉe la adiaŭo li petas min sendi Esperantajn librojn, revuojn kaj lernilojn. Ĉar spite la teruran mizeron, kiu ankoraŭ regas, homoj interesiĝas pri Esperanto, volus lerni ĝin. Ĉar poŝto ankoraŭ ne funkcias, mi sendu ĉion pere de la hungara ambasado en Kamboĝo ...

Kaj denove viglas vibra lumo en liaj okuloj.

Vilmos **Benczik**

Edwin de Kock

Haladzo el Kamboĝo

Ĉu vi flaras ĝin?
Pol Poto, pli stinka ol
Amin, Nerono,
Hitler. Ĉar ventumas lin
Ĉinujo kaj Usono.

10. 11. 1979.

Post la liberiĝo el la infero. (Meze Long Visalo)

Margit Kaffka:

MAJA PLUVEGO

Margit Kaffka estas nepre la plej elstara verkistino de la hungara literaturhistorio. Ŝi naskiĝis antaŭ cent jaroj, la 1-an de junio 1880, kaj mortis nur 38-jara, en 1918. Du ĉefaj temoj de ŝiaj verkoj estas la vivo de la malriĉiĝinta kaj morale degeneranta etnobelaro, kaj la situacio de virinoj en Hungario komence de la 20-a jarcento. Ŝiaj plej konataj romanoj estas Koloroj kaj jaroj (1912) kaj Formikejo (1917). La sufoka atmosfero de la ĉi-suba rakonto donas fidelan imagon pri la verkaro de Margit Kaffka, kiu ja ankaŭ nuntempe estas populara inter la hungaraj legantoj.

Dum tagoj ŝi akumuladis en si la melankolian prudenton, la rezignon; tiamaniere ŝi nun kapablis aplombe kontraŭsidi la virinon en la iom senkaraktera kaj apenaŭ gemuta interno de la salono. „Jen, do, tiu ĉi *„alia"* estas la edzino!" Ĉarma, seriozeta ino; en ŝia nuancriĉa kaj delikata apero estas ĉio tiom perfektiĝinta; la ĉarmo, prudenteco, iomete da melankolio... Ŝi pensis je la viro, posedata de ili ambaŭ. „Do, ankaŭ tiun ĉi li amas! Kion li ne amus en ŝi? Sed ŝi ŝajnas esti bezonata tiom *alimaniere* ol ŝi, por plenumo de tiel *alispecaj* pretendoj — ke ĉio ĉi eĉ ja ne estas konflikto. Ili ambaŭ staras ekster la sferoj de la alia!"

Tiel ŝi rigardis la alian, kun kapo klinita iom malantaŭen, duonridetante — per singardaj, vivplenaj sentoj, eĉ ne sen simpatio. Jes, estas fakte pli bone ĉi tiel; konatiĝi — poste interamikiĝi, alfronti la aferon, alkutimiĝi; dum la malsanecaj fantaziadoj de la ĵaluzo la tuto ŝajnis esti de malproksime multe pli korŝira, pli akre turmenta! Ĉefas ja, ke oni ne sufokiĝu pro suferado. Ĉi tiel ja multo solviĝos!

Tie ĉi estis ĉio kalma kaj varmeta — la momento, la bonodoro de la ĉambro, la tevaporo; — sed ĵus, venante ĉi tien, ŝi trarapidis poploaleon kun dolorige profunda spirado — inter herbaj, humidaj printemp-odoroj, kiuj ĉirkaŭnebulis ŝian solecan kapon. Anhelante kaj duonvoĉe ŝi citis versojn el fremda libro — pri la servuteca amsorto de foregaj muzulmanaj povrulinetoj — per pasia sinturmentemo. El ekstere ŝi venigis kun si ion el la peza kaj ŝvelplena patoso de la printempo, ion el la tragika streĉiĝo de la burĝonoj, herbejoj kaj la nuba firmamento; ĝi sursidis ŝiajn brovojn kaj vibris en ŝiaj voĉo kaj fingropintoj, kiam ŝi karestuŝis la manon de la edzino.

— Mi tiom ĝuas ĉi tiun grandan trankvilon ĉirkaŭ vi — ŝi diris — ĉie nura ordo, intimeco, sekuro ĉe vi. Ŝancoj ĉi tie ne ekzistas!...

— Ĉu vi volonte tion supozas? — demandis kun neatendita ekrideto la virino. — Jes — aldonis ŝi tuj mildige —, por vi aspektas tio ĉi *io alia,* Eva Major! Vi, la fortaj, sendependaj foje-foje rigardas internen tiamaniere tra malaltaj fenestroj...

Dum minuto ili silentis, kvazaŭ dirinte multon. Kaj denove ili komencis babiladi pri tiu torso, kiun al la ŝtato aĉetigis de Eva Major la konsilisto de artaferoj — la viro, kiu volis ilin vidi kune hodiaŭ. Poste pri aliaj statuoj, pri artaĵoj de fremdaj urboj, pri la nova printempa modo, kiom plastika ĝi estas. Ŝtele ambaŭ rigardis la horloĝon.

— Hodiaŭ Ákos venos pli frue — diris senafekte la konsilistedzino. — Li scias, ke mi invitis vin por hodiaŭ, kaj li multe ĝojis. Li entuziasmiĝas pri via arto, kaj, la statuoj ĝenerale, estas lia amata ĉevaleto.

Eva ekatentis: ĉu estus moko en tio ĉi? Sed la alia ridetis tiom pursincere.

— Mi supozas, ke dum sia junaĝo li kredis kelkan tempon, ke li havas ŝancon por artverkado... timeme, kaj rapide tio estingiĝis en li, li fariĝis oficisto; sed li sindone dediĉas sin al la afero. Kaj dum periodoj pli ardantaj tiom pli tio erupcias en li; se ekflagras amo aŭ io tia. Dum nia nuptvojaĝo — ho, kiel antaŭlonge tio estis — mi devis ellerni parkere ĉiujn norditalajn kolektaĵojn kaj la antikvan Romon.

Eva Major retiris sian manon iom konfuzite, mirante. Ĝis nun ŝi sentis ian malgajigan superecon tiurilate, ke nur ŝi vidas klare el inter ili du, ke la ŝarĝo kaj doloro de ĉio premas ŝin, ĉar la forta estas sole ŝi — dum tiu ĉi alia povas ŝirmite envolviĝi en la sekurecon de sia situacio... Sed kial ŝi parolas ĉi tiel? Cu ŝi konjektas ion?... „Ne, karulineto, ci ja ne povas scii, ke li estis hieraŭ vespere ĉe mi en la ateliero, ke ni amoris, dum ci atendis lin hejmen de bankedo, brodante perlojn ĝis noktomezo! Li provizas cin per ĉio kaj estas tenera, ĉu? Bone, sed ci ne povas scii, ke ĉi-somere, dum ci banferios, li pasigos kun mi du semajnojn en Florenco!..." Ŝiaj pensoj krude spitis la doloron en tia nekontrolebla formo; kaj ŝi sidiĝis pli proksimen al la alia.

Tiel trovis ilin la viro. Li venis el la klubejo — kun impresoj pri freŝdataj aferoj, traktadoj; kun tiu forta vivĝuo, ke lin aktive koncernas multspecaj aferoj. Jam de la pordo li pririgardis ilin ĉi tiel kunestantajn — per eteta bagateliga suvereneco — per kompata kaj moka plezuro. Poste li kisis la manon de la edzino kaj eksidis kontraŭ la knabino.

Ili komencis iom tro senĝenan kaj viglan babiladon. Ekspozicioj, teatro, vojaĝoj kaj regionoj... ĉiuj forte atentis — la du virinoj kontrolis unu la alian per streĉitaj nervoj — vortojn, rigardojn, akcentojn — kaj ĉio jam ekhavis iaspecan simbolan tranĉakron, kaŝitan sencon por la viro. Tuta aro de sekretaj, riproĉaj aŭ koketaj aludoj je okazintaj intimaĵoj, je profundspuraj minutoj, babiladoj. Tio ne plu estis senĝena — kvankam flata kaj vigliga — ĉar per tio li ja sentigis sin mem pli forte. Li ekstaris kaj faris kelkajn paŝojn.

— Estas varme ĉi tie. Kial oni ĉiam ankoraŭ hejtas, karulino?

— Frostis ja antaŭ kelkaj tagoj.

— Se vi irus eksteren — diris preskaŭ impete la knabino —, ĉio jam estas frenezige plena printempo — zumsonoras kaj hastas la naturo. Trairu nur la aleon, kiam tie supre kunfandiĝas la nuboj, kaj oni antaŭperceptas la odoron de la pluvo!...

— Pluvas — diris la dommastro, ĉar intertempe li malfermis la balkonpordon kaj elpaŝis. — Li ektremetis. Aŭdace freŝa fluo dispeladis la varmetajn bonodorojn de la ĉambro. Ekstere la viro profunde ekspiris kaj turnis sin kun stranga, refreŝiĝinta mieno — de sur la sojlo li ŝtelsendis esploran, mildemolan rigardon al la knabino.

— Ĉu vi alportos ŝalon por mi, Ákos? — vokis eksteren la virino, troigante iomete la intiman lakonecon.

Kiam li eniris la najbaran ĉambron — tra la malfermiĝanta pordo ŝajnotuŝis la okulojn de la gasto ornamaĵo de latuna lito; per ĉiuj siaj nervoj ŝi atentis tien dum momento, sed ŝi ne povis certiĝi: ĉu lito unusola — aŭ du?... La viro revenis kun du franĝumitaj silkaj tukoj en la manoj.

— Ho, pardonu, Eva — ekruĝiĝis la virino —, mi pensis, ke nur mi estas ĉambrofloro, frostema. Vi ja venas el ekstere!...

— Mi devas ja foriri! — malkvietiĝis la knabino. — Ho, ve, pasis la naŭa!

— Pluvegas ja, vi ĝisatendos la ĉeson! — diris la viro serioze.

Ĉiuj leviĝis per ekira, irpreta movo; ili elpaŝis sur la tegmentitan balkonon. Ekstere torentis kaj pluvegis, en la ĝardeno de la vilao ek-ekfajreris la gruzita vojo, la pordego-kradoj; la blankajn ŝtonfostojn ade batis, ba-

tegis la akvo kun renoviĝanta, ekscite ritma bruo — kun ribelanta, sufoka siblado.

— Malgravaĵo, vi vespermanĝos kun ni — decidis la mastrino kun deca afableco.

— Dio, mia, duono antaŭ la deka. La tramo trafikas al nia kvartalo nur ĝis la deka.

— Ni telefonos por veturilo! — proponis la konsilisto. La edzino alrigardis Evan.

— En la ĉirkaŭaĵo eblas nur el unu vilao; sed tiuj ne estas hejme! Kaj de la spicvendisto, sed li jam longe fermis. Eĉ, vi malvarmumus ĝis tien, Ákos! La piedoj de Mari doloras, kaj vi ja scias, kiel febla, tusema estas la maljuna kuiristino!

— Kion do?

— Nu, kion, Eva Major tranoktos ĉe ni!

— Bonege!

— Ne, neeble. Mi atendos la pluvoĉeson.

La virineto interrompis ŝin — nekompreneble refreŝiĝinte, rideme, paroleme.

— Pluvos longe kaj eĉ poste — la vojo plenas de ĝrandaj flakoj kaj kotkaĉo, eĉ veturigisto nun ne entreprenus tion! Cetere ja, kiu vin atendas hejme? Kiu estas bohema, ne estu tiel pretendema! En la ĉambro de Ákos, ĉu bone? — sur la granda divano. Mian edzon ni lokigos por hodiaŭ pli internen — jen, deviga situacio! Ho, vi levos nian domon je arthistoria signifo, ĉu ne? Momenton, tuj mi disponos ekstere!

Mole ŝi envolvis sin en la silkan tukon — ŝia bela, bruna hararo ekbrilis sub la lampo — el la pordo ŝi reridetis. — Estis en ŝiaj okuloj iomete da malico... aŭ nur negliĝa certeco?

Ĥva Major restis ekstere sur la balkono, ŝi kubutapogiĝis, spektis la tempeston, la pluvon, ĉi tiun freŝige fremdan okazaĵon de nuboj kaj tero; ŝi estus ŝatinta troviĝi ekstere en la mallumo, esti jam kuranta tra la aleo aŭ fermi sin, estante tute sola; kaj per amara kolero ŝi ribelis interne, ke ŝi falis en kaptilon. Ne eblas liberiĝi — nepras fintoleri ĉi tion!

Ŝi aŭdis malantaŭ si la nervozajn paŝojn de la viro, trairanta unufoje la ĉambron. ... En lia ĉambro, jes — kie aliokaze oni pretigas la liton por li, kie — (kiom da fojoj li menciis dum la minutoj de la deziro kaj amo) — li kelkfoje songis pri ŝi! Pri ŝi kaj ŝiaj brakumoj... sed nun oni lokigos lin „pli internen" por hodiaŭ, jes — sur la etaĝo ne estas pli ol kvar ĉambroj!... Disigos ilin la manĝejo kaj la salono; ŝi frostotremos tie sola, humiligita, prirabita — dum la viron, *la ŝian* alproprigos pere de ŝi tiu ĉi alia, fanfaronanta, ruza partnerino en la ludo, kiun hodiaŭ tiome favoras la hazardo — ke ŝi sukcesas per leĝera mokemo atutgajni ĉiujn avantaĝojn de sia situacio.

Nu, jes, ŝi ja konsciis pri tio — nature! Pri tio ŝi devis kalkuli — eĉ, ŝi kalkulis pri tio — ŝi baraktis, ploris kaj faris kompromison; jes, junan, beletan, bonan edzinon neniu preterlasas nekisita — tio ja estas devo, deco, eĉ kutimo. — Sed *vidi* ĉi tiel, tutproksime ĉi tiun trankvilan memkompreneblecon en tiu ĉi kontakto, kiu estas multe pli malnova ol tiu kun ŝi; kaj samtiom eĉ postvivos ĝin! Ĉar tiu ĉi estas obtuziĝinta kaj trankviliga bazkoloro de la vivo, ĉiam tolerebla — dum ŝi, ŝi estas nur dimanĉa okazo, horo de pimpiteco, sturmanta, rapida pasio, maja pluvego...

Ŝi ne povas fuĝi, ĉi tion ŝi devas elporti hodiaŭ! Vespermanĝi kun ili *kiel tria* kaj esti atestanto de tio, kiel afektos, ridos kaj pepados la alia — kiel ŝi priservos lin familiarece —, aŭ tuŝos, karesos lin per langvora tenero, dum ŝi rememoros foje-foje per dentklakiga ekscito pri manpremo aŭ tuŝo... Hodiaŭ ŝi estos kruela kaj venĝema pro suspektema virina instinkto — ŝia rigardo iĝos pli kaj pli akomodiĝanta — kaj ŝia tuta eta estaĵo trankviliĝinta, kortuŝa, knabineca. Kaj ŝi sidos tie paralizite, humiligita, perdinta memfidon kaj ĉion — nur ekploregi ne licas, nek helpkrii aŭ forkuri. Dece ŝi konversacios kun ili, ĝis la virino vokos sian edzon enlitiĝi, kaj ili ridetante etendos al ŝi la manojn. Ŝi eĉ ne rajtas objeti al la alia, ke tiu ĉi viro vespermanĝis hieraŭ ĉe ŝi en la ateliero, kaj kiam ili poste sidiĝis sur la kusenan kanapon — li estingis unue la lumon... Ne, ne eblas elporti ĉi tiujn malicajn, mokajn, murdajn kontrastojn de la sorto!

Kion nun sentas tiu ĉi homo? Ĉi tiun viziton deziris li — honorigi li intencis sian karulinon, esprimi respekton —, degne li permesis, ke ŝi amikiĝu kun la laŭleĝa edzino. Dankema ŝi estu pro tio!... Fi!

Se ŝi ofendus hodiaŭ vespere per io, per malica vorto la virinon, se ŝi ne kapablus priregi sian amarecon... kion dirus tiu ĉi bone edukita sinjoro, kiu eble facilanime eĉ ĝuas la kuriozan aromon de la situacio? Se ili interkverelus ĉi tie antaŭ li — kun kiu li estus solidara? Tutcerte ŝi restus sen protekto, unusola... sed tio almenaŭ estus ankaŭ por li iom ĝena! „Vi estas tiel prudenta, kiel viro; vi scias, vi komprenas tion!!" — li diris, se ŝi provis ribeli. Estas facile ĉi tiel — senriske fidi la forton de mizera virino. La alia estas protektita; la tuta ŝarĝo kuŝas sur ŝia vundoplena amo! Ĉiam nur doni, perdi, dividi, kompromisi kaj senhalte atenti; ĉu ne estas ankoraŭ la tempo de foriro! — ĉi tio restis por ŝi!

Ho, se nur estus jam ĉio finita! Se nur ekmateniĝus por ŝi! Forte aromanta, belega mateno venos post la pluva nokto kaj ŝi estos trairanta tie la ĝardenon, la poploaleon kun bluringaj okuloj, mortlaca, prirabita — kiel soleca, kuraĝa, malsukcesinta rabobirdo — taŭzita, amara kaj sennesta...

— Eva, ĉu vi ne malvarmumos? — demandis de tute proksime la viro, per sufokita, hezitplena flustrado kaj li kliniĝis super ŝian ŝultron.

— Lasu min! Foriĝu! Mi malamas vin! Neniam plu mi deziras vidi vin! — ŝi spiregis al li tremante kaj sufokiĝante.

Kaj tiu retiriĝis per hasta, horora movo... li aŭdis la paŝojn de sia edzino.

El la hungara tradukis: László *Mauksinszky*

Nazim Hikmet

La nuboj ne mortigu homon

Patrinoj naskis nin ĉiujn;
antaŭ ni marŝas la lumoj.
Ĉu ne ankaŭ vin naskis patrino?
Indulgu la patrinojn, sinjoroj.
La nuboj ne mortigu homon.

Kuras knabo sesjara,
la paperdrako pelas sin inter la arboj.
Ankaŭ vi tiel kuris iam.
Indulgu la knabojn, sinjoroj.
La nuboj ne mortigu homon.

Junedzinoj antaŭ spegulo kombas sian hararon,
kaj serĉas iun en la spegulo.
Certe ankaŭ vin ili serĉadis iam.
Indulgu la junedzinojn, sinjoroj.
La nuboj ne mortigu homon.

Dum la maljuneco la homo
devas nutri sin per dolĉaj rememoroj.
Kompatindaj ili estas, indulgu la maljunulojn, sinjoroj.
Ho, sinjoroj, ankaŭ vi estas maljunuloj.
La nuboj ne mortigu homon.

El la turka tradukis: Nijazi Hjusejinov

Verda estas nia plago

„Oni akceptas kiel universalan esperantan flagon, la flagon de la Boulogne'a Grupo (verda tuko) longa je 1,20 metro, kun maldekstra supra angulo blanka (0,50x0,50) kaj sur tiu ĉi blankaĵo, verda stelo." Tiel oni rezoluciis en Bulonjo 1905 08 09, dum la Unua Universala Kongreso de Esperanto. Oni komprenas tiun rezolucion oficialigo ne nur de flago, sed ankaŭ de insigno esperantista (verda stelo), kelkaj eĉ de „koloro de Esperanto" (verda). Oni uzas ilin kaj por la lingvo, kaj por la movado.

Ilian antaŭhistorion publikigis WIESENFELD 1933. La oficiala protokolo de la Bulonja Kongreso enhavas nur la rezolucion mem (Unua Universala... p. 24). Sed pri la kongresaj debatoj ni konas ankaŭ pliajn detalojn, dank' al Friedrich Schneeberger, pioniro de la Esperanta stenografio, kiu faris kaj publikigis detalajn notojn pri la Bulonja Kongreso. Sub la prezido de Emile Boirac, dum la kvara ĝenerala kunsido okazis la jenaj:

„D-ro Hanauer-Germano: Mi vidis la verdan stelon jam en diversaj manieroj kaj mi volas demandi, ĉu la kongreso ne devas fiksi la definitivan formon de nia signo?

Prezidanto: Oni ankaŭ proponis al mi, ĉu la Esperantistoj ne devus havi propran Esperantan flagon: blankan flagon kun verda stelo?

(Inter aplaŭdego de la tuta kongreso D-ro Ostrovski-Ruso montras kaj svingas la Esperantistan flagon de la grupo de Bulonjo-sur-Maro, kiu ornamas la kongresan ĉambregon.)

Prezidanto: Via aplaŭdado montras al mi, ke vi konsentas, ke de nun tiu ĉi flago estu la oficiala flago de la Esperantistoj."

(SCHNEEBERGER 1906 p. 86)

Do, kontraŭe al la konata *Deklaracio pri Esperantismo* kaj la rezolucioj de la aliaj kongresoj, *tiun rezolucion pri la flago oni improvizis,* t. e. oni rezoluciis senprepare kaj senkonsidere.

Kvankam la tradicio uzi la rezolucie fiksitan flagon estas forta, la malemo tion fari estas same forta. De 1905 ree kaj ree oni povas legi en la movada gazetaro plendojn de fervoruloj, ke dum tiu kaj tiu esperantista aranĝaĵo oni forgesis pri la flago, aŭ „flirtis nur unu".

La unua venko de la formiĝanta opozicio de la flago okazis en 1956: *Fundamenta principaro de informado pri la Internacia Lingvo* avertis pri danĝero de tro multe da steloj kaj flagoj, kiuj donas al la movado sektecan karakteron kaj kompromitas la movadon. Kaj tiun principaron kongresa rezolucio en Ateno 1976 08 07 deklaris aktuala ĝis hodiaŭ.

Poste kolorpsikologiaj esploroj pravigis la opozicion: evidentiĝis, ke *niaj flago kaj stelo estas absolute maltaŭgaj por propagandaj celoj.* La multaj kolor-prefer-esploroj (el kiuj la plej detalan faris la Budapeŝta Teknika Universitato en 1964—1974) pruvis, ke elekto de verda koloro estas preskaŭ la plej malfeliĉa. *Oranĝa, ruĝa kaj blua estas la plej preferataj koloroj en ĉiu aĝo kaj sekso* (krom uloj kun difektita menso).

Fine, surbaze de la sciencaj esplorrezultoj, *reklamfakulo prezentis la damaĝojn de la verda koloro ĝenerale, kaj de la verda stelo speciale* (CONRAD 1974 p. 4—6, 1977 p. 13—17). Sed por propagandaj celoj eĉ preferata koloro ne taŭgas: ĉio devas esti bunta, kiel la vivo. En bone elektitaj kombinaĵoj kompreneble jam ankaŭ la verda povas roli.

Niaj tradiciaj flago kaj stelo do, estu uzataj nur en niaj internaj rondoj, tre limigite kaj modeste. Atingi tion ne ĉiam estas facile, ĉar ni devas kontraŭstari ne nur al la „verdaj dogmistoj", sed ankaŭ al tiuj, kiuj iumomente konsterniĝante pri la damaĝoj, ekpostulas tujan enkondukon de la taŭga, bone uzebla flago, inda je nia movado. *Nia tasko estas: konsciigi pri la verda plago.* Precipe tiujn, kiuj bonintence damaĝas, ne perceptante la diferencegon inter relikvo el la pioniraj tempoj kaj propagandilo de nia epoko.

Referencoj

CONRAD, Günter: Manlibro de varbado. München, 1974. 79 p.

CONRAD, Günter: Dua manlibro de varbado. München, 1977. 70 p.

Fundamenta principaro de informado pri la Internacia Lingvo, Frostavallen 1956 07 30. En: Statuto kaj regularoj de UEA. Rotterdam, 1968. p. 58—62.

SCHNEEBERGER, Fr.: Detala raporto pri la oficialaj paroladoj, diskutoj kaj decidoj de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-sur-Maro Aŭgusto 1905. Laŭfon, 1906. 91, 14 p.

Unua Universala Kongreso de Esperanto, Boulogne-sur-Mer, 5—13 Aŭgusto 1905. Paris, 1906 32 p.

WIESENFELD, E.: Insigno. En: Enciklopedio de Esperanto, 1. vol. Budapest, 1933. p. 240—243.

D-ro Árpád **Rátkai**

Bernard Golden

Memorigo pri pioniraj hungaraj volapukistoj

Solenado de la centjara datreveno de la naskiĝo de Volapuko

La jaro 1978 estis memorinda en la historio de Esperanto pro la jubileo de *Lingwe Uniwersala*, la unua formo de Esperanto, kiun Zamenhof debutigis antaŭ cent jaroj en decembro 1878. Ankaŭ 1979 havis sian internacilingvan solenaĵon. En tiu jaro la planlingvo Volapuko atingis sian jarcentan mejloŝtonon.

La 31-an de marto 1879 en la Badenia vilaĝo Litzelstetten apud Konstanco en Germanio, la romkatolika pastro Johann Martin Schleyer ricevis per revelacio la inspiron krei internacian lingvon. Dum la sekva monato la poliglota kleriko, kiu studis pli ol 80 lingvojn, ellaboris sian planlingvon kaj komencis publikigi informojn pri ĝi en *Sionsharfe* (Ciona Harpo), katolika poezia monatgazeto, kiun li mem redaktis kaj eldonis.

La vesperon de la 31-a de marto 1979, la ankoraŭ fidelaj adeptoj de la ŝlejera lingvo, kun plena pokalo en la mano, tostis al la memoro de tiu eminenta pioniro de la planlingvistiko, kies granda kontribuaĵo estis la kreado de la unua internacia lingvo sukcese uzata por venki lingvajn barojn tra la tuta mondo. Laŭ mia enketo, ekzistas hodiaŭ nur deko da homoj, kiuj formas la ĝisvivantan volapukan movadon. Mi ne sukcesis spuri iun *volapükaflen* (amiko de Volapuko) en Hungario, sed se tiuspeca malofta fervorulo troviĝas ie en la lando, li estas centprocente izolita, ĉar aliaj volapukistoj scias nenion pri li. Tamen, li povus uzi la okazon de la datreveno de Volapuko por atentigi la publikon pri la agado de hungaroj en la disvastigo de Volapuko.

La ĝenerala historio de la volapuka movado estas sufiĉe bone dokumentita kaj konata al interlingvistoj. Ĝi floris dum relative mallonga tempo en la jardeko 1879—1889 kaj havis adeptojn en ĉiuj kontinentoj de la mondo. Post sia apogeo en 1889, la movado dekadencis pro skismo inter la konservativa Schleyer kaj reformemuloj celantaj simpligi Volapukon. Patro Schleyer mortis en 1912, sed la volapuka movado, kiu jam antaŭ tiu dato agoniis, rifuzis morti. En la 1920-aj jaroj svisa volapukisto redaktis gazeton, kaj en 1931 la nederlanda kuracisto d-ro Arie de Jong publikigis sian reformitan Volapukon. La Akademio de Volapuko estis revivigita, nova periodaĵo estis eldonita kaj la volapuka movado ricevis impeton. La fenomeno de malgranda sed persista aro da fervoraj volapukistoj hodiaŭ, kiuj volas konduki sian lingvon trans la sojlon de ĝia unua jarcento en la duan, estas klarigebla nur surbaze de ia sentimentala ligiĝo al Volapuko; praktikan utilon en la nuntempa mondo tiu lingvo ja tute ne havas.

Hungario estis unu el la landoj, kie Volapuko frue enradikiĝis. Sendube la honoron esti la unua hungara volapukisto meritas György Bánfi, katastra registristo el Sopron (antaŭe konata kiel Ödenburg), kiu poste transloĝiĝis al Kapuvár. Li unue okupiĝis pri sia propra planlingvo, sed, leginte artikolon pri Volapuko aperintan en aŭgusto 1879 en germana instruista gazeto, li forlasis sian projekton kaj adeptiĝis en la lingvo de Schleyer. Li skribis sian unuan leteron al la aŭtoro de Volapuko en novembro 1879 kaj en majo de la sekva jaro li fariĝis la dua diplomita „mondlingva instruisto". Li aktivis en la volapuka movado kiel kontribuanto al *Volapükagased* (Volapuka Gazeto) kaj ankaŭ kiel propagandisto en hungaraj periodaĵoj (v. *Győri Közlöny*, 1886). Ernest Drezen en sia *Historio de la Mondolingvo* (p. 101) donas misinformojn pri Bánfi, identigante lin kun alia volapukisto, Juraj aŭ Georg Bauer, gimnazia instruisto en Zagrebo, kiu eksvolapukistiĝis kaj kreis sian propran planlingvan projekton *Spelin*.

Alia frua hungara volapukisto estis József Fazekas, diplomita instruisto de Volapuko, kiu komencis instrui la lingvon en 1886. Li estis korespondanto de *Cogabled Volapükelas* (Sercfolio de la Volapukistoj), humura gazeto eldonita en Munkeno. Fazekas baldaŭ forlasis Volapukon kaj ellaboris sian propran volapukidan lingvon *Hómapar*, publikigitan en 188? kaj denove en 1913.

Dum la unua jardeko post la naskiĝo de Volapuko, mondlingvaj kluboj estis fonditaj en ĉiuj anguloj de Aŭstrio—Hungario, de Fiume (nun Rijeka) ĝis Debrecen, kaj de Salzburg ĝis Sarajevo. La volapuka movado estis bone reprezentita en Budapeŝto, kie troviĝis en 1889 dek ses diplomitaj mondlingvaj instruistoj, ses superaj instruistoj kaj du profesoroj. En la hungara ĉefurbo estis eldonitaj tradukaĵoj de du gravaj lernolibroj: Sándor Sz. Nagy hungarigis verkon de d-ro M. Obhlidal, la fondinto de la unua aŭstria volapuka societo, kaj Béla Zsigmondy elfrancigis volapukan gramatikon de Auguste Kerckhoffs, la direktoro de la Akademio de Volapuko. Tiuj ĉi du libroj estis publikigitaj respektive en 1887 kaj 1888. Ankaŭ en la urbo Pécs en la samaj jaroj aperis verkoj pri Volapuko.

Izor (József) Gebaur, kiu naskiĝis en Pécs en 1839, estis kleriko de la cistercia ordeno kaj gimnazia direktoro. Li agadis kiel gvidanto de la loka volapuka grupo en Pécs kaj publikigis en tiu urbo en 1887 kaj 1888 gramatikon de Volapuko. Pli grava estas lia kontribuo al la volapuka literaturo. *Div belema Tátra* (La trezoro de Tatra-montaro), eldonita en 1891, estis lia volapukigo de novelo de Ferenc Kölcsey, kies originala hungara titolo estas *A kárpáti kincstár* (La karpata trezorejo). En 1888 li verkis originale en Volapuko *Natamilags tel in Nugän* (Du naturmirindaĵoj en Hungario), temantan pri la gutŝtona kaverno Aggtelek kaj la glacikaverno Dobŝiná, tiu ĉi nuntempe en Ceĥoslovakio. Gebaur ankaŭ kontribuis artikolojn kaj poemojn al volapukistaj periodaĵoj kiel la fama berlina *Zi vol lölik* (Cirkaŭ la mondo). 'Li fariĝis membro de la Volapuka Akademio kaj korespondis kun aliaj adeptoj en Eŭropo, Ameriko kaj Azio. Fine, en 1906, li esperantistiĝis!

Valoran kontribuaĵon al la traduka beletro en Volapuko faris ankaŭ Pál Madarassy (1828—1903), kiu estis altranga ekonomia kaj financa funkciulo en Hungario dum la lasta kvarono de la 19-a jarcento. Sub la pseŭdonimo Pál Tarnay, tiu eminentulo verkis komediojn kaj operetojn kaj ankaŭ hungarigis verkojn de Émile Zola. Propranome li publikigis tradukaĵojn de hungara poezio en Volapuko. Aleksandro Petőfi estis prezentita al la volapuka publiko per jenaj verkoj: *Zübimabledems de sep de Etelke* (Cipresaj foliaroj de la tombo de Etelke), 1890; *Löfamagabs* (Am-perloj), 1890; *Lefogs* (Nuboj), 1890. En *Flolemil poedotas nugänik* (Bukedo de hungaraj poemoj), 1889, Madarassy volapukigis du poemojn de Petőfi, unu de Emil Ábrányi, kaj unu popolkanton. Ankaŭ Madarassy estis elektita volapuka akademiano.

En la 1890-aj jaroj la volapuka movado en Hungario ĉesis funkcii kaj, same kiel aliloke, tiuj eksvolapukistoj, kiuj ne tute perdis interesiĝon pri internacia lingvo, aŭ fariĝis adeptoj de *Idiom Neutral*, la nova lingvo adoptita de la transformita Akademio de Volapuko, aŭ aliĝis al la kreskanta Esperanto-movado.

Ĉapitroj el la histori

Zoltán Halász

La Konsilia

Béla Kun kun la komisaroj; manifestacio de la laboristaj batalionoj en majo 1919

Dek-krona monero, el epoko de la Konsilia Respubliko

Dum sia mallonga ekzistado, la Konsilia Respubliko komencis enkonduki profundajn reformojn. Ĝi establis tutlande la sistemon de konsilantaroj, surbaze de la ĝenerala balotrajto kaj pere de sekreta voĉdonado organizis elektojn, ŝtatigis la bankojn, fabrikojn kaj grandbienojn, larĝigis la socialan asekuron, enkondukis la okhoran labortagon, signife antaŭenigis la kulturan vivon kaj helpis la naskiĝon de artaj kreaĵoj.

Sed la juna socialisma ŝtato baldaŭ fariĝis celpunkto de l' atakoj de la entento-ŝtatoj. Francaj, rumanaj, serbaj kaj ĉeĥaj trupoj kune atakis, kaj ili atingis konsiderindajn sukcesojn. En ĉi tiu kriza situacio, la Registaro de la Revolucio dekretis ĝeneralan mobilizon, kaj en la norda fronto la Ruĝa Armeo realigis sukcesan ofensivon. En la okcidenta parto de la reakirita teritorio estis deklarita la Slovaka Konsilia Respubliko.

Malgraŭ la sukcesoj, la Hungara Konsilia Respubliko troviĝis en malfacila situacio. De la Soveta Ruslando, luktanta tiam por la vivo, oni ne povis atendi helpon; aliflanke, la blokado de l' entento malebligis akiri mangaĵojn kaj krudmaterialojn. Pro koliziadoj kaj eraroj kulpitaj de l' gvidado, malfortikiĝis la interna fronto. Unu el la plej gravaj eraroj estis la ŝtatigo de l' grandbienoj, anstataŭ ilia distribuado; ĉar tiamaniere la teron dezireganta kampularo perdis multon el sia revoluciemo. Samtempe, komencis rekonsciiĝi la fortoj de l' reakcio, fuĝintaj sur hungarajn teritoriojn okupitajn de la francaj kaj aŭstraj trupoj. Estrate de grafo Gyula Károlyi, formiĝis tie kontraŭrevolucia registaro, kies ministro pri armeo estis nomita admiralo Miklós Horthy.

Jen la antaŭaĵoj de tio, ke laŭ peto de Clémenceau, la Registaro de la Revolucio ĉesigis la gloran antaŭeniron de l' armeo en la norda fronto. Samtempe, la rumanaj trupoj ne plenumis sian promeson faritan al Clémenceau, pri evakuo de la teritorioj de ili okupitaj. La Ruĝa Armeo provis realigi ofensivon, sed tio fiaskis pro la multe plia armiteco kaj la nombra supereco de la malamiko. La rumana armeo ekmarŝis al Budapeŝto.

La 1-an de aŭgusto, la Registaro de la Revolucio demisiis, kaj la potencon transprenis sindikata registaro. La Hungara Konsilia Respubliko daŭris nur

Proletinfanoj ludantaj en ĝardeno de la Reĝa Palaco

de la hungara popolo



La plej granda provo
de kontraŭrevolucia komploto,
dum la Konsilia Respubliko,
okazis la 24-an de junio 1919.
Gi estis sufokata dum kelkaj horoj

V

Respubliko kaj la kontraurevolucio

Fine de majo Tibor Szamuely entreprenis danĝeran peraviadilan vojaĝon en Sovetunion. Lenin kaj Szamuely, la 25-an de majo 1919, sur la Ruĝa Placo

133 tagojn, sed restis la memoro de ĝiaj bataloj, kaj ĝiaj rezultoj fariĝis parto de la hungara historio kiel tradicio tre progresema, kiel la unuaj paŝoj sur la vojo de l' pli postaj bataloj.

La sindikatan registaron, formitan post la malvenko de l' Konsilia Respubliko, baldaŭ faligis komploto. Komence de aŭtuno 1919, la efektiva potenco trapasis, iom post iom, en manojn de la Nacia Armeo estrata far Miklós Horthy (1868—1957). Horthy, kiu devenis de l' etnobelaro, estis iama adjutanto de Francisko Jozefo kaj nun marista oficiro, malfermis larĝan vojon antaŭ la dekstraj militistaj organizaĵoj, komencantaj tutlande sangsoifan teroron. Rezulte de elektadoj realigitaj en atmosfero de l' teroro, kreiĝis la Nacia Asembleo, far kiu Horthy estis nomata regento la 1-an de marto 1920. Laŭ decido de la Nacia Asembleo, la lando restis monarkio.

La packontrakto de Trianon starigis ekstreme akrajn kondiĉojn. Interalie, la teritorioj loĝataj de naciaj minoritatoj devis esti transdonitaj al la najbaraj landoj. Sed ankaŭ pli ol 300 mil hungaroj vivis en tiuj teritorioj, apartenontaj al poste kreotaj ŝtatoj. La regantaj klasoj de Hungario devis akcepti ĉi tiun packontrakton, sed samtempe, ili volis forigi de si la respondecon antaŭ la publika opinio. Tial, apenaŭ subskribinte la packontrakton (la 4-an de junio 1920), ili komencis revizii la samon kaj propagandi por la reakiro de l' teritorioj aneksitaj de la najbaraj landoj. Jen kio gvidis Hungarion ĝis la pli posta modifo de la „status quo", kaj ĝis la alianco kun Italio kaj la Hitlera Germanio.

Tradukis: *VHZS*

Ekzekuto de l' membroj de la Szekszárd-a direktorio

István Torda

Jarcentoj de la hungara literaturo

7. „Nacia klasikismo" kaj la jarcentfino

La epoko nomata „nacia klasikismo" en la hungara literaturo komenciĝis en la 40-aj jaroj de la 19-a jarcento, kaj daŭris ĝis la komenco de la 60-aj. Grandaj reprezentantoj de ĝia unua periodo estis Petőfi, Arany kaj Eötvös. Post la falo de la revolucia liberbatalo de 1848—1849 parto de la verkistoj instruis la nacion pri memkonado, pri liberiĝo disde la iluzioj. Surbaze de tio kunplektiĝis ĉe ili romantikismo kun realismo.

Granda romantikisto

Mór Jókai [Jokai] (1825—1904) estis la plej granda romantika prozisto hungara. Ĉirkaŭ liaj romanoj formiĝis Hungarlande la vasta legantaro en la moderna senco de la vorto. Por tiu ĉi publiko eĉ hodiaŭ li estas la plej ŝatata verkisto.

Aĝanta dudek jarojn, kiel amiko de Petőfi, Jókai fariĝis unu el la gvidantoj de la juna literaturo hungara en la urbo Pest. Kaj li iĝis ankaŭ redaktoro de la revuo de tiu literaturo, *„Életképek"* (Vivbildoj). La grandegan popularecon li akiris per siaj romanoj. Unu el ili kaj samtempe unu el la plej gravaj estas la *Hungara Nababo* (1853), en kiu temis pri la vivo de la hungara nobelaro en la unua parto de la 19-a jarcento. Ĉi tiu romano estis kvazaŭ serio de anekdotoj kaj vivbildoj. El la pli postaj Jókai-romanoj al tiu tipo apartenas la *Nova Bienulo* (1863). Tiu ĉi verko montras, kiel iĝas iama kontraŭhungarema generalo de la subpremanta imperiestra armeo dum iom da jaroj entuziasma patrioto hungara. Post la jaro 1867, kiam la hungaraj regantaj klasoj kompromisis kun la Habsburga dinastio, Jókai verkis romantikajn romanojn pri herooj, t.e. roman-epopeojn. La plej grava el ili estas *La Filoj de l' Ŝtonkora Homo* (1869),[1] kies agado okazas dum la revolucia liberbatalo de 1848—1849. La tria tipo de romanoj fare de Jókai estas la roman-konfeso. En 1873 li verkis la romanon *La Ora Homo*. En ĝi speguliĝas la etoso de krizo. Jókai devis kompreni, ke la „burĝiga liberalismo" de la meznobelaro, al kiu apartenis ankaŭ li, pravigas la esperojn nek sur la ekonomia, nek sur la socia nek sur la morala kampoj. La „Ora Homo" estas brava, talenta ŝipisto Danuba, Mihály Timár, kiu ekhavas — ne tute honeste — trezorojn de riĉega komercisto greka, fuĝanta el la Osmana Imperio. Li edukigas, poste ankaŭ edzinigas la adoleskan filinon de la komercisto, sed ilia geedzeco estas malfeliĉa. Li seniluziiĝas pri la burĝa mondo, bazita sur la havado, sur la mono, kaj trovas sian mion en kaŝita angulo de la Sub-Danuba regiono, sur „Nenies Insulo." Ĉi tiu romano povus esti naiva utopio, sed Jókai en neniu romano donis tiel aŭtentikajn psikoanalizojn, kiel en tiu ĉi romantikega. En la lastaj jardekoj de la longa vivo de tiu ĉi verkisto formiĝis ĉe li lia kvara roman-tipo, la aventurromano. Cetere, pri puraj tipoj temeblas neniam. Ekzemple la romano *Eppur si muove* (alia titolo: Tamen Moviĝas la Tero — Red.), montranta la unuan periodon de la 19-a jarcento, apartenas al la tipo de roman-epopeoj, sed en la unua ĉapitro troviĝas unu el la plej belaj vivbildoj, de Jókai kaj ankaŭ aventurmotivojn abunde ĝi havas.

Jókai la realon vidis en bildoj. Lia eksterordinara fantazio, rakontemo pleje disvolviĝis en la grandaj scenoj — kiel tion menciis unu el liaj analizantoj. Li aperigis en la verkoj enormajn bildojn, similantajn la grandformatajn pentraĵojn. Lia origine pentrisma realmontro efektiviĝis pere de bildigo de inundo, batalo, tertremo, sieĝo, glacifendo sur la Balatono, amasmalsato, brua diboĉo.

Kemény kaj Madách

En *Zsigmond Kemény* [Kemenj] (1814—1875) troviĝis tio, kio mankis ĉe Jókai: filozofiemo, pasio pri la psikoanalizo, kapablo pri la individuigo.

La filozofiaj studoj kondukis la verkiston al la senkondiĉa kredo plej ofte tragika pri la realigo de la individuo: kie la individuo estas rezignita, tie la vivo perdiĝas. Li iĝis pesimisto, ĉar la vivon de la individuo en la socio li vidis tragika. En siaj romanoj kun plumpa agado li fariĝis majstro, kiam li montris animstatojn. La bazajn motivojn de la feŭdismaj rilatoj (ekzemple Romeo kaj Julieta) li plenigis per moderna enhavo. Pasiojn de la 19-a jarcento li retroprojekciis al la Transilvaniaj herooj de la 16-a, 17-a jarcentoj *(Vidvino kaj ŝia Filino, Zelotoj).*

En la nomaro de la hungaraj verkistoj krom Petőfi eble *Imre Madách* [Madaĉ] (1823—1864) ne estas tute nekonata por literature kulturita ne hungaro. Liajn nomon kaj verkon la leganto povas

Kálmán Mikszáth

aligi al *Faŭsto* de Goethe, al *Manfredo* de Byron, al *Peer Gynt* de Ibsen.

Pri neniu literatura verko hungara disvolviĝis tiom da diskutoj, kiom pri *La Tragedio de l' Homo*. Ĝia unua protektanto estis János Arany, la plej granda poeto de la epoko, ĝia unua atakanto János Erdélyi, ties plej grava estetikisto hungara. La drama poemo estis finita en la jaro 1860. Ĝiaj protagonistoj estas Adamo, Eva kaj Lucifero. La verko konsistas el dekkvin bildoj, t.e. scenoj. La unuaj tri kaj la dekkvina estas la kadrobildoj, kiuj okazas en la ĉielo, en la paradizo kaj en palmobosko fariĝinta hejmo de la unua homparo post la forpelo el la paradizo. En tiuj ĉi kvar bildoj partoprenas ankaŭ la Sinjoro. En la internaj dekunu scenoj Lucifero montras vizion pri la homa historio al Adamo kaj Eva, post ke li magie endormigis ilin. Aperas la konstruado de Egiptia piramido, Atena popolkunveno, Romia orgio, pridogma disputo en la mezepoka Bizanco, la kortego de la imperiestro Rudolfo en Prago kun la genia astronomo Kepler, la granda franca revolucio, la burĝa Londono, falanstero imagita laŭ la utopia socialisto Fourier, finfine la mondo en la epoko de la osa termalvarmiĝo. La ekstera konstruado de la verko esprimas la internan, la historifilozofian. Madách akceptis la ideon de Hegel, laŭ kiu ĉiu fazo de la evoluo en si mem havas kaj poste naskas sian antagoniston kaj el ilia lukto estiĝas la nova, la sekva evolufazo. Sed tiu laŭ la Madách-a koncepto ne estas nepre pli alta ŝtupo. La homo en la lasta historia bildo descendis ĝis tia primitiva nivelo, kiun preskaŭ nenio dividas disde la animaleco. Adamo, vekiĝinta el la prihistoria koŝmaro, volas forĵeti la vivon, sed Eva konfesas al li: en ŝia utero jam kreskas ido. Adamo komprenas: li devas entrepreni la lukton eĉ konsciante pri ties fino. Tiam eksonas la voĉo de la Sinjoro: „Mi diris, luktu hom' kaj firme fidu!"

Verkistoj de la jarcentfino

En 1867 efektiviĝis kompromiso inter la dinastio de Habsburgoj kaj Hungario. En la sekva epoko disvolviĝis la realismo en la hungara literaturo.

La plej granda poeto de la jarcentfino estis *János Vajda* [Vajda] (1827—1897). Li estis adepto de la burĝiĝo, vera jakobena „civitano". Li pasie malamegis ne nur la fremdajn subpremantojn kaj iliajn obeulojn, sed ankaŭ la denaskajn privilegiojn, la socion hierarkian. En la 70-aj jaroj li programe turnis sin al la poezio pensema, filozofia. Kun memturmenta scivolo li meditis pri la eternaj problemoj de la konado (estado, morto, senfineco de la materio ktp.), kiuj estas karakterizaj ne pro ilia originaleco, sed pro la liberigo de la sentoj, pro la poezia finpensado de la ideoj. Simboloj de Vajda preparis la modernan lirikon hungaran. Tion faris per siaj poezioj liaj du poet-kolegoj, mortintaj junaĝe, *Gyula Reviczky* [Revicki] (1855—1889)[2] kaj *Jenő Komjáthy* [Komjati] (1858—1895), kies verkadojn impresis filozofio de Schopenhauer kaj tiu de Nietzsche.

Apud Jókai la plej legata hungara verkisto pasintjarcenta, unu el la plej grandaj majstroj de la hungara prozo estis *Kálmán Mikszáth* [Miksat] (1847—1910). En la literaturon li brue eniris en 1881 kun sia novelaro *Slovakaj Vilaĝanoj*. Ekde 1882 aperis liaj literaturaj krokizoj priparlamentaj. Depost tiu tempo lia vivovojo pli ol du jardekojn kunplektiĝis kun la parlamento, kiun ankaŭ li aniĝis poste, kiel deputito. En siaj noveletoj li evoluigis la anekdoteskan rakontmanieron, kiu ĉe Jókai servas prefere kiel amuzilo. Ĉe Mikszáth tio proksimiĝas al la groteskо, tiamaniere liberiĝas la tipeca, socia enhavo de la noveloj.

aperinta en Esperanto en 1978 en la formo de bildromano

En la lastaj jaroj de la pasinta jarcento disvolviĝis la originala realismo de Mikszáth. Tiam li verkis unun el la plej belaj, kortuŝaj Donkihot-historioj, kies titolo estas *Sieĝo de Beszterce*. En la satira romano, *Nova Zrinyiado* li revivigas heroon[3], batalintan en la 16-a jarcento kontraŭ turkoj por montri, kiel devus la antikvaj herooj ekzekuti la degerintajn praidojn.

Siajn grandajn romanojn Mikszáth verkis jam en la unua jardeko de la 20-a jarcento. La plej grava instruo de lia bela romano *Stranga Geedziĝo:* la feŭda socio estas malamiko de la homa feliĉo. En *La okazo de la Noszty-knabo kun Mari Tóth* (1908) temas pri tio, ke orgojla, sed jam degenerinta kaj malriĉiĝinta familio nobela volas edzigi sian plej junan anon al Mari Tóth, filino de riĉa burĝo hungara, reveninta el Usono. La montro de la nobela familio, tiu de la departementa administrado, tiu de la publika vivo egale estas majstraĵoj verkistaj. La lasta Mikszáth-romano, la *Nigra Urbo* estas historia romano, verkita kun granda talento pri la urbanoj de la 17-jarcenta Lőcse (nun Levoča en Slovakio).

Kálmán Mikszáth montris ekzemplon al la hungara literaturo de prozo senigita disde idealigo, retorismo, pseŭda patoso.

El la hungara: P. A. **Rados**

[1]Bildrakonta varianto de tiu romano aperis antaŭ du jaroj en Esperanto. Ĝi ankoraŭ laĉeteblas. Pri Jókai vd. n-ron 4/1975 de HV.
[2]Interesa kontakto inter la hungara kaj Esperanta literaturoj: super poemo de Auld, dediĉita al Kalocsay en „Kvaropo", kiel moto staras verso de Reviczky.
[3]Pri li vd. n-ron 2/1979 de HV.

Someraj aranĝoj en la Esperantista Kulturdomo de Grésillon

Prelegoj: Diverstemaj prelegoj, diskutoj pri la prelegoj, praktikado kaj studado de la lingvo, malkovro de la regiono. Alveno la 1-an de julio, foriro la 21-an de julio.
Kursoj: Rektametoda kurso por komencantoj, grupa praktikado de la lingvo, tradukado, studado de Esperantaj verkoj, gramatiko; manlaboroj, malkovro de la regiono. Alveno la 22-an de julio, foriro la 11-an de aŭgusto.
Artlaboroj: Fotoarto (fotado, rivelado, prezento de la faritaj fotoj), folkloraj dancoj, manlaboroj, studado kaj praktikado de la lingvo, malkovro de la regiono.
Alveno la 12-an de aŭgusto, foriro la 1-an de septembro. Interesiĝantoj skribu al: *Kastelo Grésillon, F—49150 Baugé Francio.*

Tibor Bessenyei

Kvar elementoj

Tero

Vi donas fruktojn
al la homoj mizeraj.
Nin ja Vi nutras
donante la produktojn:
ni ne estu fieraj.

Akvo

Senfinaj ondoj,
de kie Vi elvenas,
vivon nutrantaj?
Ĉu ne el Viaj rondoj
ĉiu vivo devenas?

Aero

Nin Vi ĉirkaŭas.
Nur per Vi estas vivo.
Ĉiam Vin laŭdas
kaj sopiras soifo:
sedativo.

Fajro

Brulantaj flamoj,
kiuj ĉion purigas,
Viaj arkanoj
malbonon forbruligas;
ĉiun pekon nuligas.

William Auld

— *prezidanto de la Akademio!*

Prof. G. Waringhien, dum 16 jaroj prezidanto de la Akademio de Esperanto, pro motivoj de aĝo kaj sano demisiis. Tion faris samtempe kaj sammotive ankaŭ la meritplena sekretario, s-ro Roger Bernard. Pro tio okazis novaj elektoj en la Akademio, kies rezultoj estis la jenaj: *Prezidanto:* William Auld. *Vicprezidantoj:* Paul Neergard kaj Stojan Ĝuĝev. *Sekretario:* Albert Goodheir.

Nia Redakcio elkore gratulas kaj deziras multan sukceson al la nova estraro de la Akademio, speciale al la nova prezidanto, William Auld, kiu foje-foje honoras per siaj kontribuaĵoj ankaŭ nian revuon.

Problemoj de arta tradukado povas esti interesaj por ĉiu literaturamanto

babel

Revuo de Internacia Unuiĝo de Tradukistoj (FIT)
Ĉefredaktoro: György Radó

En ĉiu numero informoj pri Esperanto-tradukoj, analizoj

En la numero 1979/3: Vilmos Benczik: Esperanto translation in Asia

Aperas po unu volumo jare, en kvar kajeroj
Kun artikoloj en angla, franca, kelkfoje en aliaj lingvoj
Abonprezo de unu volumo: 120 Forintoj
Abonebla ĉe Akadémia Kiadó (1054. Budapest, V. Alkotmány u. 21.)
Eksterlande ĝin disvastigas KULTURA Külkereskedelmi Vállalat (1389. Budapest, I. Fő u. 32.)
Abonprezo por jaro $ 12

Eldonas
AKADÉMIA KIADÓ
BUDAPEST

Mihály Váci (1924—1970):

De tiam

La okan de majo 1945 finiĝis la dua mondmilito.
Oni enkondukis novan eraon.
Oni anoncis la epokon de l' mondpaco.

Kaj oni tuj ekagis.

Oni pelis milojn da diverslandaj soldatoj en kaptitejojn,
centmilojn gardis en milspecaj inspekt-tendaroj de la mondo,
dekmilojn enprizonigis sur la globo de l' paco,
centojn da spionoj kaj kontraŭspionoj, perfiduloj kaj kredkonfesantoj,

kondamnis en procesoj historie brilaj;
oni perfektigis la plej riskoplenan malkovron de l' scienco,
ellaboris la certan sistemon de l'
totala bato kaj rebato, nesupereblajn rezultojn
oni atingis en la humana apliko
de kemiaj armiloj, napalmo,
kaj de iloj paralizaj, senfoliigaj, ter-sodigaj, duoble
pli da bomboj oni produktis kaj ĵetis sur
vilaĝojn suspirantajn pro timo, ol estis
ŝutitaj dum la dua mondmilito sur Eŭropon, kaj de tiam
preskaŭ tiel multaj mortis inter flavuloj, nigruloj kaj blankuloj
pro la ekscesoj de rasa kaj klasa malamo,
kiom en la gaskameroj de l' dua mondmilito,
almenaŭ trioble pli da revoluciuloj estis ekzekutitaj,
ol kiom da ili mortis por la hispana revolucio,
centmilojn oni mortigis en ne-deĉifreblaj lokaj militoj;
de tiam sur la animo de l' homaro pezas pli granda krimo
pro la leĝigita ekstermado de la krizantem-anima vjetnama popolo,
ol pro la amastomboj en Ukrainio, de tiam pli da cinikeco, sadismo,
nacia malamo kaj antaŭjuĝoj inundis sur la Teron,
ol kiom enkorpigis la aparato de Hitler; la mono,
konkeremo, potenco trafinta en malbonajn manojn
krimis pli en la tria mondo
ol la ankoraŭ ne-repagitaj kvarcent jaroj de koloniigo,
tankoj surbruis revoluciojn de sentimaj landetoj,
oni plugis kaj semis per salo la fekundpromesan grandan animon
de Lumumba, sur la Ŝegeŝvara batalkampo de nia jarcento oni trapikis Che Guevara,
per armiloj Made in USA oni mortpafis du filojn de Usono, kiuj
volis surpaŝi ne nur Lunon, sed ankaŭ grundon de Usono pli sobra,
oni mortigis King, ventumanton de l' sufoka mizero
de nigruloj, mortigis pli da sud-amerikaj indianoj, ol
sukcesis dum samlonga tempo Cortés
kaj la porkpaŝtisto Pizarro.

La eta grasa Italio suĉadas interfingre
la najtingalojn de Eŭropo, ĝi voras niajn koturnojn,
la homo sate elsputas la delikatan viandon de multaj centoj da
formortantaj animhavaj bestoj, niaj emancipitaj prostituitinoj
vestas sian nude-ostentan korpon per plumoj de rariĝintaj birdoj, siajn
dis etenditajn krurojn ornamas per botoj el haŭto de junaj fokoj,
aŭtistaj sinjoroj ekstermas ravajn kolombarojn de
historiaj urboj, ĉar tiuj malpurigas la karoseriojn,
la spirantajn ĝardenojn de urboj surverŝas per betono por havi parkumejojn.
De tiam oni malpurigis la dolĉajn akvojn de l' Tero, per radioaktivaj materialoj
venenis la mondajn marojn, infektis
la aeron, min-semis ŝoseojn,
faris milita bazo Lunon, kaj la stratosferon arsenalo,
plantis en nin novajn korojn kaj novajn timegojn,
niajn modestajn pretendojn malkuraĝigas
la histerio de rentabilitato, raciigo, produktiveco,
el la pensoj de niaj plej bonaj intelektoj
malaperas la zorgo pri planado de homa feliĉo, forigas
ĝin la eŭforio de konkero de l' kosmo. Progresas la materia mondo,
kaj tim-haltas homo, la vivo estas pli komforta,
sed pli trista. Pri la esto ni scias multe pli,
ol povi elteni ĝin, ni malkovras ĉion
pri la materio, kaj perdas sian memkonfidon
la homa spirito. Ni reguligas la naturon,
kaj nin mem envoras nia nereguligebla naturo,
inter tiom da perfektaj objektoj
la homo perdas ĉiam pli el sia perfekteco.

Kaj de tiam nove kaj denove ni ekas, konspirantoj pri bono,

por refuti tiun ĉi historion,
kaj trovi argumenton por la senkulpigo de l' homaro.

El la hungara tradukis: V. *Benczik*

Daniel L. Mason

Patro mia

La vagonaraj radoj klakadas fervoje. Lace kaj enue la maljuna viro rigardas la rapide pasantan pejzaĝon. Lia vizaĝo estas cindroblanka; lia haŭto seka kaj sulketita kiel aŭtuna folio. La malgranda, preskaŭ senhara kapo testude etendiĝas el la faldoj de dikmola, nigra palto. Peze li sidas sur malnova, verda benkseĝo, kiu, kvankam remburita, estas iom rigida kaj malkomforta. Dum la longaj horoj de la vojaĝo, li alterne dormetas kaj vekiĝetas. Senfine kaj senfeliĉe la ĉagrenaj pensoj turmentas lian memoron. Ekster la kupea fenestro, senfoliaj, malsekaj arboj rapide pasas. Riveretoj, plenaj pro la vintraj pluvoj, kote serpentumas tra grizverdaj kaj pajlflavaj kampoj. La suno estas pala disko, preskaŭ ne videbla, malantaŭ hela tavolo de altaj nuboj. Trans ĉi tiu arĝenta ĉielo la vento balaas vicojn de pezaj malaltaj nimbusoj bluaj kaj purpuraj — la avangardo de nova ŝtormo.

Frotante siajn okulojn, la maljunulo palpebrumas kontraŭ la blublanka vintra lumo. Kvankam rigardante la fenestron, la urĝe rapidantan kamparon li ne vidas, sed la estinteco estas tre klara kaj brilas kiel printempa ĝardeno.

La maljunulo feble klopodas malstriktigi sian kolumon kaj hazarde tuŝetas paperon sur sia palta refaldo. Li abrupte memoras la matenon kaj la vortojn de sia bofilino.

— Bopaĉjo, ni amas vin, sed ni ne havas tempon... — ŝi diris dolĉe. Li memoras, ke la vortoj iom kolerigis lin malgraŭ la dolĉa voĉo.

— Ĉu vere... ne havas tempon? — li ripetis mokesprime.

— Jes, ni ne havas tempon — ŝi rigardis lin. — Vi povas iri al via sekreta filo, pri kiu ni neniam sciis.

— Mi ne havas alian filon!

— Li devas esti la via, la nomo estas la sama, kaj la adoptejo havas registrilon tre malnovan. Nur hazarde la social-asekura agento trovis la aferon!

La maljunulo silentis. Dum la pasinta monato, de kiam li forlasis la hospitalon, li estis feliĉa kaj iomete resaniĝis. Per marŝbastono li povas eĉ marŝi. Efektive li ŝatas la grandan domon de sia filo. Dum kelkaj jaroj, antaŭ la apopleksio, li loĝis sola inter la bruo, en la izoliteco de la centra metropolo en malgranda mansardo. Nun li havas trankvilan ĉambron, kie tra la fenestro li povas vidi la ĝardenon. Preskaŭ ĉiutage la genepoj ludas en la ĝardeno kun la hundo, aŭ gaje salutas lin sur la koridoro, kaj ravite aŭskultas liajn rakontojn. Jes, li estas feliĉa, maljuna sed feliĉa. Nur ĉi tiu bofilino ne plaĉas al li. Kvankam bela, ŝi estas tro estrema kaj precizema. Nur svelta junulino ŝi estas, sed volus ŝajni eleganta moŝta sinjorino.

— Do, ne gravas, kien mi iros! — li grumblis. — Baldaŭ mi mortos.

— Ne diru tion, bopaĉjo! Vi preskaŭ resaniĝis. Kial paroli pri morto? — ŝi respondis.

— Jes, kaj post la morto mi ne plu ĉagrenos vin — li daŭrigis ignorante ŝin.

— Liza, venu ĉi tien! Helpu al la sinjoro... — La bofilino iris en la koridoron kaj revenis. — La servistino forestas. Nu, metu vian manon en la manikon. Mi nem helpos vin.

— Ne rapidu, mia ŝultro terure doloras. — Tre malrapide kaj dolormiene li surmetis la palton kun ŝia helpo. Post longa grimaco li daŭrigis la plendojn: — Jes ja, kaj tiu artrito estas aĉa malsano... Kie estas mia filo? Ĉu li ne adiaŭos min ĉe la stacidomo?

— Mi jam klarigis al vi, ke mia kara edzo, kiu hazarde estas via filo, no povos. Vi ja scias, ke li estas en sia oficejo, kaj tre okupita.

— Kaj la infanoj?

— Ili estas en la lernejo, kaj mi mem devos iri al kunveno en la urbon. Do, Liza kondukos vin al la stacidomo, kaj tio sufiĉos.

×

La maljunulo lasas siajn klopodojn malstriktigi la kolumon kaj lace rigardas la pejzaĝon. Senfina ciklo de malsekaj kampoj kaj boskoj preterpasas. La morna kamparo krepusketas sub la malheliĝanta ĉielo. Sur pasanta kampo, nigra kaj plugita, vicoj da pluvplenigitaj sulkoj arĝente spegulas la grizajn nubojn. Enue la kilometroj grincas for. La teda klakado de la vagonaro dormigas kaj la senĉesa ritmo ŝajnas al li malnovaj flustraĵoj. Geavoj, gepatroj, kaj geamikoj longe mortintaj murmuras obtuze. Preskaŭ forgesitaj voĉoj allogas lin. La blanka, kalva kapo kliniĝas. La spiro siblas tra lozaj lipoj. Li ekdormetas. Profundiĝante en maltrankvilan sonĝon, li nervoze vagadas laŭ blanka, hospitala koridoro urĝe serĉante iun. La koridoro odoras de malnovaj kemiaĵoj kaj malsanoj. Naŭze li flaras la haladzon de etero. Turniĝante ĉe angulo laŭ la koridoro, subite li ekvidis la fremdan filon. Kurioze, la filo ŝajnas jam konata. La maljunulo meditas, kiu estas tiu filo? Eble mi jam konas lin. Mi devas paroli.

— Mi ne volis veni — li lace diris — sed ili sendis min, kontraŭ mia volo. — Ŝultrolevante li ridetas: — Kion fari? — Blankumita kaj flegma, la fila vizaĝo ne respondas. La maljunulo gestas al la filo. — Mi devas loĝi ie, ĉu ne? Do, kion fari? Mia koro ne takte batas. Mia fleginda korpo doloras tage kaj nokte. Eble mi resaniĝos, eble ne, sed nun mi ne povas iri alian vojon.

Palpebrumante la maljunulo rigardas eksteren. El pasanta bosko subite ekflugas birdaro, kirliĝas ŝvebe kiel vivanta fumo, kaj malaperas preter la linio de nudaj, vintraj arboj. Meditante li pensas pri la vizaĝo. Kiu estas tiu? Mi preskaŭ rekonis lin. Ĉu la filo aspektas tiel? Post tiom da jaroj, kia estas la filo? Kvankam li portas mian nomon, mi tute ne scias. Kaj por li mi estas nur patro forgesita... patro hontita... — Antaŭ kvindek jaroj, kiam vin mi forlasis... vi estis nur bebeto.

La maljunulo peze levas la kapon, kaj en la malhela fenestro lia ĉerkeca vizaĝo estas pale, travideble spegulata antaŭ la bolantaj amasoj de la kurantaj nimbusoj. Subnube grizaj torentoj de pluvo kunigas la teron kaj la ĉielon. Sur la fenestro la vangoj estas kavaj kaj la okuloj akve malbrilas. Estas nekredeble, li miras, ke mi povas memori pri antaŭ kvindek jaroj kiel pri hodiaŭ, sed pri hieraŭ mi tute forgesas. Sed nun mi memoras klare la tagon, kiam mi forlasis la infanon. La sunlumo tra kurteno desegnis arabeskon sur la polurita planko, kiam mi nervoze atendis la oficistinon. Sur citronflavaj muroj pendis bildoj de infanoj kies lavitaj kaj ridemaj vizaĝoj mirplene rigardis sian novan mondon.

— Mi helpos vin, sinjoro — ŝi diris.

— Jes, ne gravas, mi havas sufiĉe da tempo — li respondis, kaj metis unu femuron sur la alian. Li ne povis forgesi la premajn okazajojn de la pasintaj tagoj. La hospitalo terure frapis lian memoron. La blankaj muroj, la blankaj ĉambroj, la blanke vestitaj flegistinoj kaj kuracistoj, kiuj rapide preterpasis kiel fantomoj. La pordo malfermiĝis. Subite haladzis kloroforme, kaj kirurgo eniris en la akceptejon. Helpkirurgoj kaj geflegistoj sekvas lin. Klake ili demetis siajn kaŭĉukajn gantojn kaj formarŝis laŭ la koridoro.

— Kiel vi nomiĝas? — la oficistino metis registran paperon antaŭ si, kaj eltiris flavan krajonon el sia griza hararo.

— Johano Brunow — li diris.

— Kiel vi literumas la familian nomon?

— Bo-ro-u-no-o-ĝermana vo.

— Kiel vi nomis la bebon?

— Li ne havas nomon.

— Kial? Vi rajtas nomi vian filon.

— Ŝi rigardis lin super siaj okulvitroj.

— Jes... jes, sed ne gravas — li hezitis. — La nomo ne gravas.

— Sed estas necese havi nomon por registri vian filon en la adoptejo. Sia voĉo estis komerca kaj malvarma. — Ĉu mi povus uzi vian antaŭnomon?

— Ne, mi ne volas...

— Kial ne? Ne gravas... — ŝi ripetis moke.

— Sed... nu, mi ne scias — li balbutis.

— Kiel nomiĝas via virino? Kial ŝi nun ne estas ĉi tie?

— La virino estis edzino, ne „virino" mia — li replikis iom kolere. Kaj ŝi... — li paŭzetis — ... ŝi mortis dum la akuŝado.

— Kara dio! — Sia voĉo akre ekaltiĝis. — Mi bedaŭras! Mi tre bedaŭras. Estas terure... — La oficistino demetis siajn okulvitrojn. Sia voĉo iĝis softa kaj patrine trankviliga. — Kompatinda edzo, tiel juna kaj glatvizaĝa vi estas. Mi kredas, ke vi estas preskaŭ samaĝa kiel mia filo, apenaŭ dudekjara... Vi estas tro juna por tiu ĉi angoro. Nek malgajon, nek emocion via vizaĝo montras; vi estas tre kuraĝa.

— Jes... jes, dankon — li ne sciis ion alian por diri.

— Tiel tristega vi devas esti — ŝi klaĉe daŭrigis. — Mi esperas, ke la tempofluado maldolorigos...

— Dankon — li interrompis —, kaj la infano?

— Ho... jes, do, kompreneble, vi ne volus prizorgi la infanon senpatrine — ŝi diris molvoĉe.

— Kompreneble — li mensogis.

— Kaj via infano. Ĉu mi povus uzi vian antaŭnomon?

— Sed... — li komencis, kaj haltis per kolera suspiro, kaj lace finis — ne gravas.

— Bone — ŝi surmetis siajn okulvitrojn kaj rapide skribis kaj diris samtempe: — Johano Brunow, pli juna.

×

La maljunulo kuŝigas sian kapon sur la verdan seĝdorson. La okuloj fermiĝas. Sekaj memoroj susuras tra la menso kiel diapozitivoj projekciitaj. Maria, mi preskaŭ forgesis vian nomon. Dum multaj jaroj pasintaj, mi ne memoris pri vi. Vi estis nur bagatelo, karulino, mensoge li imagas. Eĉ post kvindek jaroj, eĉ al si mem, li ne povas permesi la veron. Li fermis sian menson antaŭ la doloraj pensoj. Nek la klaran veron, nek sian kruelaĵon li povas vidi. Somera papilio vi estis, li pensas. Poste mi reedziĝis kaj havis familion, mian propran familion. Fiera mi estas pri ĝi. Bedaŭrinde, mia edzino mortis antaŭ kvin aŭ ses jaroj. Sed mia propra filo estas kuracisto respektata, Maria. Nuntempe li estas tre okupita. Li havas gravan profesian rondon kaj du infanojn. Lia edzino estas ankaŭ tro okupita por prizorgi min. Do, mi vizitos vian filon, Maria. Al mi, li estas nekonata filo via. Sed sen mono, sen sano kaj sen alternativo mi estas. Ĉe la oficejo de social-asekuro oni diris, ke ili nur helpos min se mia familio ne volus aŭ ne povus. Kaj via filo, Maria, volas.

Arĝenta fadeno falas, eksplodetas, kaj alia, kaj aliaj. Subite la pluvo frapadas la fenestron. Palpebrume la maljunulo rigardas la ŝtormon. Ankoraŭ la arboj rapide pasas, sed nun ili estas nigraj en kreskanta krepusko, kaj la vento klinadas kaj dancigas la brancojn. Dormeme la okuloj fermiĝas. Li revidas la kristalajn gutojn surfolie post la somera pluveto, kaj la matenan roson brileti kaj speguladi sur la herbejo. Ĉu vi memoras, li pensas, la razenan verdecon de la rivereta bordo aŭ la akvon de tiu eta rivereto kristale kirĵanta super la glataj rokoj, la bruligan sunon helblankan kaj la refreŝigan venteton, kiu susuris tra ulmoj kaj fagoj je la frua vespero? Kaj la floroj, Maria, ĉu vi memoras la flavajn florojn, tiujn, kiuj dise kreskis sovaĝe sur la herba deklivo super la rivereto?

Viaj femuroj brilis atlase kiam vi levis vian jupon por kolekti la ranunkolojn kaj leontodojn. Kiel naiva liceano mi plektis lekantetojn en via hararo. Vi ridetis madone, kiam mi kisis vian ŝultron. Sur la herbejo mi disvolvis kotonan kovrilon, kaj el mia ĉemizo faris kusenon por via florita kapo. Langvore ni kune kuŝis. Dorlote vi metis viajn fingrojn en mian hararon, kaj kokete kun dolĉa esprimo tiris mian kapon al la via. Ni lipludetis. Amoreme mi kisante laŭiris la sunbrunan arkon de via kolo ĝis la ŝultro. Tiel mole kiel fumo viaj haroj frotetis mian vizaĝon. Mane mi sekvis la konturojn de viaj femuroj. Via bluzo susuris al la tero. En la silenta, somera aero mi jetis vian jupon kaj ekstaze revestis vin kise. Arde niaj korpoj kunpremiĝis. La rivereto babiladis kaj via varma spiro flustris intermite ĉe mia orelo. Tiam, kiam klinkape mi kisis viajn brunruĝajn cicojn mi flaris la aromojn de via humideta korpo kaj la parfumon de la freŝplukitaj floroj en via taŭzita hararo, sed mi ne aŭdis viajn dolĉajn mensogetojn.

— Dek minutoj! Dek minutoj ĝis la centra stacidomo! — Timigite la maljunulo suprenrigardas. La ruĝa vizaĝo de la konduktoro ŝajne flosas en la aero. La ruĝa vizaĝo proksimiĝas: — Ĉu vi malsanas?

— Kion vi diras? Mi estas preskaŭ surda, ne flustru al mi... Malsanas? Jes, jes, mi malsanas tage kaj nokte — la maljuna viro spiregadas ridete —, nun doloras mia ŝultro. — La ruĝa vizaĝo nun havas ruĝan kolon kaj blankan kolumon. — Kiam?... Dek minutoj... estas bone. Dankon. Estus tre afable, se vi povus helpi min ĉe la stacidomo. Koran dankon.

Denove li kusenigas sian kapon sur la verda seĝdorso, denove la memoroj kaŝas la aktualan mondon, kaj denove la teruraj blankaj muroj de la hospitala ĉambro ĉirkaŭas lin. Surtable staras kristala vazo kun ruĝaj floroj. Emajle la muroj spegulas la flavan elektran lumon.

— Johano, ne koleru al mi — la timigitaj okuloj de Maria rigardis lin. — Nur malforta, emociema virino mi estas, kaj tre juna kaj stulta. Mi tre amas vin, Johano. Dum la pasintaj kelkaj ravaj monatoj de geedzeco mi estis nekredeble feliĉa. Ankaŭ vi, Johano, mi vidis felicon en viaj okuloj. Karulo, ne detruu ĉion...

— Kiu estas la patro?

— Ne gravas, estis antaŭ multaj monatoj, antaŭ la geedziĝo. Estas, vi, kiun mi amas. Vi, vi, vi, Johano, vi! — Sia voĉo emocie altiĝas. Mi petegas vin, ne forlasu min, ne nun, naskontan. Mi timas pri la akuŝado, Johano. Estas ia problemo, la kuracistoj ne klarigis ĝin al mi. Kaj la bebo, Johano, ĝi estas senkulpa. Zorgu pri la infano, miaj pekoj ne estas la ĝiaj. Mi petegas vin: forlasu nek la bebon, nek min. Promeso al mi, Johano!

— Ne, Maria, ne! Neniam mi promesos tion!

Siaj molaj, ploremaj okuloj fikse rigardis lin dum momento, kaj senespere fermiĝis. La pordoj frapade bruis kiam li eliris el la hospitalo, kaj la glacia nokta aero piketis liajn vangojn.

Sufokiĝante la maljuna viro anhelas, liaj okuloj malfermiĝas. — La ĉemizo estas tro peza — li flustras kaj per nervozaj fingroj Johano penas liberigi la kolumon, kiu estas jam malstrikta. Palpebrume li ĉirkaŭrigardas. Gigantaj feraj kolonoj, tegitaj per tavolo da polvo kaj rusto, apogas altan tegmenton preskaŭ nevideblan pro fumo kaj ombroj. Flavaj fluoreskaj lumoj brilas mezalte en la grandega halo. Laŭ la malrapide pasanta kajo, senpaciencaj atendantoj staras kelkope aŭ sole, kaj serĉeme enrigardas la vagonarajn fenestrojn. Finfine la vagonaro haltas. En la bruo de la foriro, la konduktoro helpas Johanon eliri. Johano nervoze tenas sian marŝbastonon kaj lace komencas paŝeti. La nompapero sur lia palta refaldo flirtetas pro la venteto. Senrekonaj vizaĝoj rigardas lin. Viroj portantaj pluvmantelojn kaj valizojn, virinoj en peltpaltoj kun skatoloj, ombreloj, floroj kaj grandokulaj infanoj. Ĉiuj paŝetas malantaŭen por liberigi la vojeton antaŭ Johano, kiam plumbpiede li preterpasas. Malsana li aspektas, sed ankaŭ deca kaj afabla, kiel vera antikva saĝulo fantome el alia epoko.

— Tiu devas esti patro. — Iu rimarkas Johanon. La ankoraŭ nevidebla viro paŝas malantaŭ grupeto, poste trairas alian. Kurete la paŝoj rapidas. — Jes, devas esti li.

— Patro? — Subite kurantaj paŝoj frapas la pavimon.

— Patro! — Johano haltas kaj levas sian tremantan kapon.

— Patro! — Alta, dika, mezaĝa viro, kiu portas bukedon en unu mano, kurante venas. Lia vizaĝo estas preskaŭ ploresprima kaj tute nekonata. Brakojn etendante, raŭkvoĉe li krias:

— Patro... patro mia!

Pudingoj estas bongustigeblaj laŭ gusto de familianoj kaj laŭ hejmaj kutimoj. Jen kelkaj konsiloj:

Al ses kuleroj da pudingpolvo miksita en malvarma lakto ni aldonu:

por pudingo de vanilia gusto:	**unu paketon da vanilia sukero**
por tiu de citrona gusto:	**iom da raspita citron-, aŭ oranĝoŝelo**
por tiu de ĉokolada gusto:	**unu kuleron da kakao (aŭ anstataŭ lakto miksu la pudingpolvon en ses kuleroj da kafo)**
por tiu de karamela gusto:	**unu kuleron da fandita sukero (al boligita lakto)**

Mia generacio

Fraûlinoj

Attila Kiss

Ni ĉiam havas ian apartan deziron, revon, kiu kapablas dolĉigi, kolorigi la ĉutagan (ofte tre pezan, grizan) vivon. La granda amo de Attila *Kiss* estas lia edzino (poetino Dea *Várnay)* kaj la pentrarto.

Li naskiĝis en 1941 en Transilvanio (Rumanio), en la Budapeŝta Altlernejo de Artoj li lernis ĉe la granda pentristo-majstro de la ĉi-ĵarcenta hungara pentrarto, Aurél *Bernáth.* La riĉaj koloroj de liaj pentraĵoj kaj la kuraĝaj linioj de liaj grafikaĵoj iomete ankoraŭ memorigas pri la grandtalenta majstro.

Mia edzino (Dea Várnay)

De 1969 li desegnis kaj pentris multfoje sian Muzon-modelon, kaj en liaj ekspozicioj ĉi tiuj bildoj estas ĉiam ĉefrolantoj. La murojn de ilia loĝejo dense ornamas ole-pentraĵoj, kaj ĉiuj prezentas, gardas Ŝin. Nur Ŝin — kiu estas por la artisto mem la Juneco, la neelĉerpiĝanta Fonto de la eterna virina Beleco.

Jen unu el la intima (ne-vendota) kolekto *Mia edzino.* Ŝi sidas sur seĝo — tamen tio ne estas ordinara meblo, sed kvazaŭ trono. Jes, kaj Ŝi sidas sur ĝi, kiel reĝino. Ŝi ne portas sur sia kapo oran kronon, tamen, videblas, ke en tiu vivrondo, por la juna artisto ŝi estas Reĝino.

La dua bildo *Mia generacio* estas detalo de pli granda verko. Mi elektis ĝin tial, ĉar ankaŭ ĉi tie ŝi estas la centro. La motodo, laŭ kiu pentriĝis la tutkorpaj figuroj, ankaŭ sen koloroj taŭgas pruvi la talenton de A. Kiss. La bildo havas specifan atmosferon kaj gestojn, kiuj trafe karakterizas la nuntempan junan generacion.

Kaj fine malgranda desegnaĵo: *Fraulinoj.* Denove taŭga ekzemplo por speguli, ke nia artisto estas vera majstro de sia profesio. La desegnaĵo estas nur krokizo, farita ĉe Balatono aŭ Nigra Maro, eble en artlaborejo, verŝajne nur dum kelkaj minutoj, sed ni jam konas la konstantan Modelon. Jes: ĝi ne similas al la Muzo, tamen la inspirantino estis denove Ŝi.

Depost 1969 oni aranĝis multajn ekspoziciojn el liaj bildoj, ekzemple lastjare en la Budapeŝta Kulturdomo de Bulgario, kie ni vidis liajn belajn pentraĵojn pri Nesebaro, Varno, Sofio; kaj alifoje bildojn pri malnovaj domoj, stratoj de Buda kaj Danubkurbo, tamen la ĉefa, eterna amo restas Ŝi.

Mihály *Gergely*

Saluto al la 80-jara artisto-profesoro Jenő Barcsay

Honorigo de elstara pentristo

Multaj geamikoj kaj adeptoj partoprenis la solenaĵon aranĝitan de la estraranoj de departemento Peŝt kaj de urbo Szentendre honore al Jenő Barcsay, Kossuth-premiita pentroartisto, okaze de lia 80a naskiĝtago. La estimata majstro instruis artan anatomion al generacioj de pentristoj kaj skulptistoj en la Budapeŝta Altlernejo de Belartoj. Sur nia Bildo D-ro Iván Csicsai, vicprezidanto de la Peŝtdepartementa Konsilio salutas Jenő Barcsay. La meza persono sur la bildo estas Endre Baráth, vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, parlamentano, unua sekretario de la partia komitato en Szentendre.

600 mil vizitantoj ĉe Margit Kovács

Szentendre, la malgranda paradizo de belartistoj forte allogas interesiĝantojn ne nur per siaj bela situo, romantikaj stratoj kaj ĉarmaj, buntaj domoj de historia etoso, sed ankaŭ per siaj riĉaj kolaktoĵoj, pli-malpli grandaj muzeoj. Laŭ la statistiko de Muzeoj de la Danubokurbiĝo pli ol unu miliono da personoj vizitis pasintjare la diversajn muzeojn de Szentendre. Preskaŭ 60 procentoj de la vizitantoj, — do 600 mil homoj rigardis la Kolektaĵon el la verkoj de Margit Kovács. La muzeo, aranĝita en la iama domo de la antaŭ 3 jaroj mortinta ceramik-artistino prezentas 300 verkojn; skulptaĵojn, reliefojn de originale ĉarmo.

Sildo sur la muro de la muzeo Kovács Margit. La potisto

Hungario — inda turisma celo

Vojaĝagentejoj, turismaj oficejoj renkontiĝis en la komenco de la jaro en Munkeno por reciproke prezenti siajn ofertojn. El Hungario partoprenis la agentejoj Express, Ibusz, Pannonia, Cooptourist, Hungarhotels kaj Volántourist. La eksterlandaj vojaĝoficejoj multe interesiĝas kaj pri grupaj kaj pri individuaj ekskursoj al Hungario. Ankoraŭ ĉiam plej serĉataj estas la Budapeŝtaj kaj Balatonaj ofertoj, sed la hungaraj vojaĝoficejoj klopodas popularigi ankaŭ la valorajn kulturajn kaj amuzajn programojn kaj la belajn naturajn ĉirkaŭaĵojn de pluraj aliaj hungaraj urboj, kiel Debrecen. Eger, Szombathely, Kőszeg kaj Pécs.





Sceno el la TV-filmo pri la vivo de Martin Luther King

Kvarcentjara ĉevalaro de Lipica

Arkiduko Karlo Habsburg fondis en 1580 ĉevalaron en Lipica (Lipizza), proksime al Triesto. La malmola fundo de la roka altplatajo, la kalka trinkakvo kaj la celkonscia bredado, selektado rezultigis tre fortan, tamen gracian specon; la faman ĉevalon de Lipica. En 1809 la tuta ĉevalaro estis rifuĝigita antaŭ Napoleono en Hungarion, al Mezőhegyes. Nur post la batalo ĉe Waterloo la ĉevaloj estis rekondukitaj al Lipica, sed parto de ili restis en Hungario por plua bredado. Ok genroj estas distingitaj inter la ĉevaloj de Lipica, el ili du estas hungardevenaj.

La mondfama Maneĝejo de Vieno uzas nur ĉevalojn de Lipica pro iliaj eminentaj ecoj. Ankaŭ ĉe ĉaristo-konkuro ili estas multe frekventataj.

De 1951 estis establita nova bredejo por ĉevalidoj sur la altaĵoj de la montaro Bükk apud Szilvásvárad. La nuna ĉevalaro tiea parte devenas el Mezőhegyes, parte rekte el Lipica. Pluraj dekmiloj da turistoj vizitadas ĉiujare la belan ĉevalaron sin paŝtantan, ludantan aŭ ekzercatan sur la pitoreskaj deklivoj de la montaro Bükk.

Grupo de ĉevaloj de Lipica sur herbejo de montaro Bükk



Martin Luther King en la hungara Televido

Abby Mann, scenaristo kaj reĝisoro, kiu ricevis Oscar-premion pro sia filmo la „Verdikto en Nürnberg", en 1966 decidis fari filmon pri Martin Luther King, kiu tiutempe jam estis distingita per la Pacpremio Nobel. Post du jaroj la fama gvidanto de la „senperforta" movado por la civitanaj rajtoj de la negroj en Usono estis mortigita. La ses horojn longa animskua TV-filmo tamen pretiĝis post dek jaroj. La ĉefa direndo de la filmo estas prezenti la decidan signifon de King en la tiutempa Usono kaj la aktualecon de liaj celoj eĉ hodiaŭ.

La hungara Televido prezentis la filmserion en aprilo en la unua kanalo por la hungaraj spektantoj.

Hungara sukceso en Monte Carlo

Hungara sukceso naskiĝis en la 20a TV-festivalo en Monte Carlo. En la kategorio de dokument- kaj raportfilmoj la filmo de la hungara ĵurnalisto-reportero Alajos Chrudinák ricevis la grandan premion de la festivalo, la Oran Nimfon. La titolo de la filmo estas: *Sur ĵipo en Saharo.*

La bela hejmo komenciĝas ĉe kuirejo...

Gå-la **gasforno**



sekura
ekonomia
rapida
muntebla al karbogaso,
tergaso kaj
propanbutano

6 – 750/4 – LV tipo

lampart

Lampart Zománcipari Művek
1105 Budapest, Gergely u. 27.
Telefono: 570-111

REVUO DE REVUOJ

Ĉu vi blufas? — demandis William *Auld* interjuante nian redaktoron Vilmos *Benczik* pri la jam konata slogano *Kvazaŭ revivigus Literatura Mondo*... Responde al tiu ŝerca „provokado" reliefigis la eldona politiko de Hungara E-Asocio. Ĝia ĉefa celo identas al unu celo de la iama Literatura Mondo, nome: vastigi plejeble la Esperante legantan publikon! Konvenaj cirkonstancoj en la hungara movado, ĉeesto de spiritaj kaj materiaj fortoj malfermis al ampleksa libroeldonado la vojon: oni devis senhezite surpaŝi ĝin!

Same kiel W. Auld, ankaŭ mi optimisme rigardas al la propagandistoj, al la aktivuloj de libroservoj, al la fervoraj volontuloj, kiuj — videble — ne preterlasas la eblojn por firmigi nian movadon surloke pere de librobretoj.

El la alvenintaj gazetoj mi kaptas *estonlingvan ĵurnalon* pri sporto, SPORTDILEHT, kiu publikas per fidela traduko nian intervju-serion kun mondĉampionoj (HV 79/4. p. 152.). Sukcesa ago de niaj estonaj kolegoj! Tiun propagandcelan artikolon akceptis bona eĥo ankaŭ en aliaj landoj, por nun mencii nur Italion (Milano), kaj la aliajn utiligantojn alifoje.

Pri interlingvaj problemoj atentigas ofte la INT. INFORMA SERVO. Aŭtune simpoziono de Unesko traktis en Parizo la rajton je komunikado. Evidentas, ke tiun rajton oni realigas per lingvo, sekvas do la lingva problemo, ĉu oni povas uzi sian lingvon internacie? Multaj popoloj devas uzi en internaciaj rilatoj *ĉiam* fremdan lingvon, ĝin lerni, foruzi tiucele tempon kaj energion. Vera perdo por la plejmulto, ja nur eta procento restas kiuj ellernas fremdlingvon. Trafa ekzemplo estas citata: al internacia konferenco — egale ĉu scienca, faka aŭ interŝtata — estos elektita reprezentanto aŭ la konvena fakulo reganta la lingvon de la konferenco, aŭ tia fakulo, kiu *ne regas* tiun lingvon. Sekve tiu fakulo nur „pasive" partoprenos, kaj estos en malavantaĝa pozicio dum diskutoj, malgraŭ siaj talentoj. Kion IIS preteris en tiu ekzemplo, estas la pli malbona solvo flanke de la elektantoj: sendi *malpli fakscian* personon, kiu almenaŭ regas la fremdlingvon. En ambaŭ lastaj okazoj la reprezentanto (kaj lia lando) iĝos duarangaj en la konferenco... Ĝenerale en oficialaj rondoj oni ne konscias sufiĉe pri tiu problemo, eĉ malpli pri la jam eltrovita solvo.

Jam mi alvenis al la internacia sfero. MONDA KARUSELO publikis personan raportaĵon de anglino Helga *Rapley:* kuriozaj travivaĵoj en Monako de tajpistino, kiu kuraĝis laboron serĉi en tiu paradizo de milionuloj kaj miliarduloj. Fiaj humiligoj sin sekvis — fine ŝi devis kun la edzo lasi la paradizon, retiri sin al la hejmlando kun ne multe de ŝancoj trovi postenon ĉi tie.

Pri aktualaj aferoj en la mondo malofte troviĝas artikoloj en nia gazetaro, kvankam tiu priskribo, de sube montranta la vivon, signas temaron de certaj diskriminacioj ankaŭ gravaj! Laŭdinde PACO publikigis kortuŝan priskribon de ĉeĥa ĵurnalisto pri sia vizito en la Vjetnamia limregiono post la ĉina militatako. Ankaŭ legindaj mi trovis artikolojn de Canko *Murgin* pri la frua krepusko de Eo en Bulgario. Historia epoko de nia literaturo prezentiĝas ankaŭ sur paĝoj de la renomaj KULTURAJ KAJEROJ: preskaŭ forgesita verkisto la fondinto de Literatura Mondo, Teodoro *Schwarz* antaŭvenas helpe de *nia arkeologo, Bernard Golden.* Kaj decas la plezuriga fakto, ke pri grava hungara esperantisto memoras alilanda E-revuo, kio cetere ofte okazas. Ni kunvivas ja en internacia movado! Tiun penson emfazis mem Teodoro Schwarz, kiam mi intervjuis lin por la Eo-programo de Radio Budapest. Dum la grandega 51a UK en la hungara ĉefurbo, li rakontis por la mikrofono gajajn epizodojn pri la unua etapo de la Lo-Mo-rondo, tuj internacia.

En HUNGARA FERVOJISTA MONDO daŭras la faklingve grava artikolserio de L. *Boronkay* pri la fervojtekniko, kun la necesaj inĝenieraj desegnoj. Tia merito markas ankaŭ la jam menciitan Kulturaj Kajeroj-n, publikigantan el la plumo de R. *Lloancy* teknikhistorian malkovron: Leonardo *de Vinĉi* antaŭvidis kaj decegnis biciklon *kun celtaŭgaj* mekanikaj partoj!

Eo ebligas plenan disfloradon de la lingva *kreemo,* sen la ne-logikaj trudaĵoj de la etna — multjarcenta — lingvouzo. Pedagogoj en niaj rondoj jam asertis ofte tiun ĉi kvalifikon de nia lingvo, ĝenerale pri lernejaj infanoj. En LITERATURA FOIRO Claude *Piron* nun kolektis ĉiujn psikologiajn malkovrojn pri la et-infanaj etapoj de la disvolviĝo de parolkapablo. Montriĝas, ke la lingvo de infano estas pli krea ol imita. Longaj procezoj okazas, dum kiuj konstruiĝas sed ankaŭ paralele modifiĝas la lingva strukturo de la infanoj, kiuj montras mirindan *gramatikan* senton. La infano *konstruas* por si lingvan strukturon, manipuladas per ĝi *logike:* vera kreado! Tamen laŭvice, precipe dum lernejvizitado la infano alproprigas lingvajn tradiciaĵojn, kvankam kun multaj eraroj: reaperas la propra kreemo. Rifuzatas mense multaj esceptaj formoj, obeantaj la tradicion. Oni ne lasas daŭre kreadi la infanon; oni altrudas kaj obeigas, la pensado tiel pli kaj pli damaĝiĝas. *Eo estas tolerema,* malpli perforta rilateal la persona konceptado, ol etnaj lingvoj. Tiel pruvas Piron la komence legeblan aserton, tiel liveras bone funditan argumenton pri la eduka signifo de Eo.

KOMUNA E-GAZETO (el Nederlando) kaj DIA REGNO (de KELI) preskaŭ samtempe elpaŝas por la lingve justa rolo de la prefikso *„mal".* De pluraj flankoj kritikantoj rajdas al atako kontraŭ tiu, ververe ege utila vortar-ŝparanta prefikso. La aŭtoroj pruvas, ke tiu ĉi (aŭ samsenca) prefikso troviĝas kaj en la latinidaj, kaj en la ĝermanaj, slavaj, baltaj lingvoj; la senco ĝenerale enhavas ian „malbonan", kontraŭan de io pozitiva, Tiel la *mal-* vortoj aperas por la menso kiel „negativaj", kiel sprite dirite: en lingva rolo de *Mefisto.*

Leteroj el diversaj landoj informas pri situacio de virinoj, en nova bulteno SEKSO KAJ EGALECO, redaktita de Anna *Brennan.* En Hinda Unio ŝi estas unuflanke „ombro de sia edzo", aliflanke emancipita — paralele al la egaj kontrastoj inter malriĉaj klasoj kaj riĉaj, inter senprestiĝaj ordinaraj virinoj kaj altedukitaj sinjorinoj. Kiel forumo pri seksa egalrajteco, oni atendas de la bulteno, de la diskutontoj: utilan kontribuon al tiu monda problemo. Progresuloj havos certe multan direndon al la vasta temaro. KONTAKTO dediĉis tutan numeron al „enrigardo en seksajn aferojn". A. Brennan daŭrigis sian interesvekan kaj spritan artikolserion pri interrilatoj de la seksoj, kion perturbas rigidiĝintaj *stereotipoj.* Ilustrita, tre lerta, leginda artikolo! Permesu tamen al mi sugesti: ne ĉiaspeca konduto, se kutima, titoleblas stereotipo! Se HV publikas reklamantan *junulinon en bankostumo,* la trinkaĵon produktanta firmo havis *plenrajte* la ideon, ke maljuna barbulo *malpli plaĉos* al la publiko. Ĉu la aŭtorino eble ne konsentos? Ne verŝajne...

Ervin *Fenyvesi*

Kuracbanejo Lukács

D-ro Ferenc László

III.

Ni konatiĝos nun kun du fratoj, kun *Lukács* kaj *Császár*. Ne nur fratoj ili estas, sed ankaŭ najbaroj, fieraj pri la alia, kaj noblaj konkurantoj: kiu el ili prezentas al siaj gastoj pli da plezuro kaj refreŝiĝo, kiu la pli feliĉan saniĝon.

Ambaŭ kuracbanejoj troviĝas ĉe la bordo de Danubo, kie kruta deklivo de l' monteto „Roza" lasas nur mallarĝan areostrion por la multaj fontoj. El trafika vidpunkto ĉi tiu loko — vid-al-vide al la insulo *Margit* — estas facile alirebla de aliaj partoj de Buda, same de Pest. Ni alvenas unue al la pli sude situanta Lukács, (Luko), poste ni konatiĝos ankaŭ kun la Császár (imperiestro).

Kuracbanejo Lukács

Romianoj mencias jam ĉi tie troveblan banejon; kroniko priskribas en la 12-a jarcento banej-domon, kie reĝo Béla la 3a gastigis Frederikon Barbarossa, tie traveturantan dum sia kruca militiro. La Malta Kavalirordeno instalis tie ĉi hospitalon por flegi la vundite revenintajn kruc-militistojn.

Ankaŭ la turkoj alte respektis ĝian ĝuindan akvon, kaj „ilin aparte plezurigis la sinlavo kaj banado, laŭrite plenumitaj ĉi tie". Ili nomis ĝin „Barut degirmene"; t. e. „banejo apud pulvomuelilo". Laŭdire paŝao Mustafa konstruigis ĉe la fontoj la muelejon kaj la Muel-lageton per digeto. La tiel akumulita varma akvo movis la muelilojn dum la tuta jaro, sen glaciiĝo.

En Vieno ĉio ĉi estis bone konata. Post la reokupo de Buda, la imperiestro tuj deklaris ĝin —

Enirejo al la termobanejo Lukács

samkiel aliajn banejojn — posedaĵojn de la fisko. Tamen sekvis dekadenca periodo por la banejo, ĝis mezo de la pasinta ĵarcento, kiam la luanto (cetere muelisto en Malnov-Buda) komencis novkonstrui ĝin. Fine de la jarcento la banejo havis jam la nunan aspekton, laŭ ideoj de la sekvantaj posedantoj. Je la jarcent-turno ĝi estis la plej moderna kaj frekventata kuracbanejo de Budapeŝto. Post iom da tempo la nova Banejo Széchenyi, kaj la Banejo Gellért iomete repuŝis ĝian famon, tamen ankaŭ nun ĝi restas grava kuracbanejo de la ĉefurbo.

La gastojn kvazaŭ magnete altiras la etoso de la pasintaj romantikaj tempoj, kion inspiras la kupoloj kaj la basenoj, eĉ la rave imponaj majestaj platanoj. Ne estas mirinde, ke en tiu tre agrabla ĉirkaŭaĵ la gastoj ofte pli alten taksas la kuracefikon de l' akvo, ol tio estas reala.

Konstantaj gastoj alkutimiĝis tien, en- kaj eksterlandaj, kiuj regule frekventas la banejon Lukács. El Vieno ekzemple oni ekskursas ĉi tien kvazaŭ venante nur de strato najbara. Ankaŭ famuloj troviĝis inter la gastoj. La verkistoj Zs. *Móricz*, D. *Kosztolányi* preferis la vaporejon kaj la ŝlimon; la komponisto *Z. Kodály* regule venis naĝi dum jardekoj — ilia memoro ŝvebas ankoraŭ sub la antikvaj kupoloj kaj la grandiozaj platanoj.

Kian kuracefikon havas la akvo? Priskribi tion apenaŭ eblas pli aŭtentike, pli konvinke ol faras la surmuraj marmortabuletoj: iamaj gastoj el foraj jardekoj memorigas dankemon esprimante pro siaj resaniĝintaj misaj movorganoj, neŭralgioj, kartilago-hernioj.

Dum la Dua Mondmilito ankaŭ tiu banejo grave difektiĝis. En la lasta kvaron-jarcento ĝi ricevis plurfoje renovigon, tamen ĝia aspekto ne ŝanĝiĝis.



Naĝejo en la Banejo Lukács

Promenante en la banejo

ni vidas, ke tie funkcias termobanejo, ŝlimbanejo, (por viroj kaj virinoj), bankuvoj, naĝejo kaj trinkhalo. Ĉi-lasta staras aparte de la cetera bankomplekso. En la termobanejo apud la kvar basenoj troviĝas 83 kajutoj, masaĝejoj, krome vaporkameroj (seka kaj malseka). Ripozejo atendas la banintojn.

La *ŝlim-lageto* de Lukács estis longdaŭre specialaĵo eksterordinara en Budapeŝto. Ververe ĝi estis de konstruaĵoj ĉirkaŭita kvarangula baseno, kies fundon kovris ŝlimo de la fontoj. Tiuj elŝprucis tra la fundo, diverskvante sed abunde. Antaŭ kvaronjarcento la hidrologoj registris 44 fontojn kun tre diversa varmeco. Pro tio la temperaturo de la baseno sinkis sub 30 C°, kion oni favore modifis kreante tute fermitan basenon en 1959.

La ŝlimbanejo estas tute izolita de la ceteraj, kvankam ĝi havas lokon en la sama domo. El ĝia vestiblo ni ekvidas tra la fenestroj la ŝlimlageton: la ŝtuparo kondukas nin supren al la vestiĝejoj, kie paralele paradas vicoj de kahelkovritaj vastaj kajutoj, sume 325.

Apude la ampleksa ripozejo plenas de kuŝejoj, sed ni descendas tute suben per lifto al la nivelo de la lageto por bani ni aŭ ricevi ŝlimpakadon. Jam en la halo eblas enmergi nin en la lag-akvon per elnaĝi al la baseno; precipe en vintro tio estas tre preferata maniero.

La subĉiela naĝejo fakte apartenas al la kuracbanejo, ja ili esit s kune konstruitaj. En Budapeŝto tiutempe — fine de la pasinta jarcento — naĝejo funkciis nur en la najbara Banejo Császár, kun subĉiela kaj tegita basenoj. Somere estis eble naĝi ankaŭ en la font-lago de Banejo Romia; krom ĝi staris je dispono kelkaj naĝejoj ene de la Danubo, ĉar tiam la riverakvo estis ankoraŭ tre pura . . . Estas do komprenebla la vasta populareco de la naĝejo Lukács. Ĝi havas du basenojn; iam unu el ili estis por viroj, la alia por virinoj.

En la naĝeja vestiĝejo 342 kajutoj kaj 864 ŝrankoj estas utiligeblaj de la gastoj. Somere, okaze de granda vizitado kroma vestiĝejo servas por pluaj 500 gastoj. La sunbanejoj situas sur

tegmentoj super la vestiĝejoj, sed ankaŭ super la aliaj sekcioj.

En la Kuracbanejo Lukács oni kuracas ankaŭ per sala-karbacida banado kaj per subakva duŝo. En ĉiuj sekcioj estas servataj kuracaj kaj kutimaj masaĝoj, ankaŭ pedikuro. La kuracbanejon vizitas tage 2000, la naĝejon 1000 gastoj; ambaŭ funkcias dum la tuta jaro.

La basenojn kompreneble oni malplenigas ĉiutage, sed tio ne estas ebla ĉe la basenoj de la ŝlimlago. Tamen helpe de troa alfluigo ankaŭ en tiuj basenoj efektive ĉiutage renoviĝas la akvo. La uzita akvo fluas tra propra kloakoreto rekte en la Danubon. Okaze de alta rivernivelo aparta pumpilaro suprenlevas la uzitan akvon.

La varmetaj fontoj de Lukács liveras ĉiuminute 6700—6800 litrojn da akvo, la varmaj fontoj kaj putoj 3200 litrojn. Kaj la varmetajn fontojn, kaj la varmakvajn — kune kun tiuj de la Banejo Császár — kunligas apartaj kondukilaroj. Tiuj du kondukilaroj provizas krom banejojn Lukács kaj Császár, ankaŭ la jam priskribitan Banejon Király.

Jen la akvotemperaturoj de kelkaj tieaj fontoj: Turka-fonto 25 C°, Romia-fonto 21 C°, Reĝo-fonto 42 C°, Muellago-fonto 21 C°. La akvoj de tiuj fontoj kaj de la tie troveblaj putoj (Antono, Lukács III kaj IV) havas karakterojn diversajn depende de la miksiĝo. La varmetaj akvoj estas simplaj mineralakvoj kun kalcia-magnezia-hidrokarbonatoj. La pli varmaj enhavas krom tio alkalojn kaj multe da fluoridoj, kaj apartenas al la kloridaj kaj sulfataj termoakvoj.



Eu la ŝlimbanejo de Lukács

Trinkhalo de Lukács

La radioaktiveco estas inter 0,6—1,0 nC per litro.

Pere de tiuj fontoj kaj putoj en Lukács estas kuraceblaj: degeneraj artriko-malsanoj, artritoj kronikaj kaj kvazaŭ-akutaj, vertebro-deformiĝoj, hernio de intervertebra disko, neŭralgioj, enostaj kalkmankoj, posttraŭmataj afekcioj. La kuracakvon oni uzas ankaŭ por trinka terapio ĉe kronikaj katar-malsanoj de stomako, intesto, gal-duktoj kaj spirorganoj.

Ĉiuj ĉi montras, ke por multaj konvenas serĉi saniĝon kaj refreŝiĝon en la Banejo Lukács. Ĝi atendas ĉiujn, kiuj fidas je la saniga kaj freŝiĝa forto de ĝia akvo.

Kuracbanejo Császár

Pluraj historiaj faktoj pruvas, ke antaŭ miljaroj jam malkovris popoloj la tie suprenvenantajn akvojn por kuraci sin. Apud la banejo arkeologoj trovis restaĵojn kiuj montras, ke tiun aron da fontoj — proksime al *Aquincum* — la romianoj daŭre uzis. Pli poste, en j. 1212 la reĝo Andreo la 2-a fiksis la eksteran limon norde de Buda per la vortoj: „Inter Budam et calidas aquas", latine: „inter Buda kaj la varmakvoj". Pri tiu loko, poste vilaĝo *Felhéviz* (Supra Termoakvo) menciis ĉefepiskopo Nikolao *Oláh* en sia verko (presita en 1536): „en direkto al Buda situas Felhéviz, kiu estas fama pro banejoj ĉirkaŭitaj de domoj de eminentuloj".

Multaj hungaraj kaj fremdlandaj vojaĝantoj simile skribis pri la banejoj de Buda, ĉiam aludante pri la banloko, antaŭulo de Császár. *Lewenklaw,* ano de sekvantaro de imperiestra ambasadoro princo *Lichtenstein,* tiel skribis pri la banejo Császár:

Fasado de la banejo Lukács, rigardanta al la Danubo

„Dum la ambasadoro longe restadis ĉe la paŝao, ni havis eblecon viziti la banejojn, ankau banadi tie. Tiuj banejoj, situis proksime al nia ŝipo. Ili estas vere grandiozaj! Pro la natura temperaturo de la akvo ĝia varmego estas tia, ke la homa korpo apenau kapablas tion toleri. La turkoj montras ilin plenrajte kun fiereco, kaj tial oni aparte zorgas pri la pureco de la banejoj. La bangastoj pagas certan sumon pro la servado kaj uzo de l' komfortigaj instalaĵoj. Antau la banloĝioj estas konstruitaj grandaj vestibloj, kie oni demetas la vestaĵojn. Ĉiu estas devigata sin antaubani kaj nur poste enpaŝi la basenon! La akvo de l' banbaseno altas ĝis kolo, kaj tial marmorbenkoj, ebligas en ĝi la sidadon . . ."

La ambasada sekvantaro tute ne hazarde konatiĝis kun la banejo, sed simple pro tio, ke laŭ la turka kutimo, la ambasado estis unue regalita en banejo. Tiam nia banejo nomiĝis „Banejo de bejo Veli". Ĝia akvoamaso estis tiom abunda, ke ĝi movis du muelilojn en la fama Muel-lageto. Al la banejo apartenis ampleksaj basenoj kun multaj bankajutoj.

El precizaj priskriboj de multaj vojaĝantoj ni bone konas la tiaman staton de la banejoj en Buda. Jam en tiu epoko ili estis lukse instalitaj kaj ekipitaj per siatempe modernaj kuracrimedoj. En verko de Edward *Brown*, eldonita en Londono, 1673, oni legas: „La naturaj varmfontoj de Buda apartenas al la plej renomaj kuracakvoj de Eŭropo", kaj li detale informas pri la Banejo de bejo Veli — la nuna Császár.

La konata turka vojaĝanto *Evlia Ĉelebi* preferis la kolorplenajn priskribojn. Kiel plaĉaj temoj aperas en lia verko la banejoj de Buda. Interalie li informas pri la interesaĵo, ke en Buda la turkoj ne bezonas „vaporbanejon", ĉar „la font-akvoj eligas tiom da vaporo, ke ĝi tute traŝvitigas la homan korpon". Laŭ li en ok lokoj elŝprucas veraj sulfuraj fontoj, kies akvoj nutras multajn „iliĝe", t. e. banejojn. Li memoras pri la Banejo de bejo Veli kiel unu el la plej agrablaj.

Post la turka regado ankaŭ tiu banejo iĝis posedaĵo de la fisko. Meritplena mecenato de beletro kaj artoj, István *Marczibányi* en 1802 aĉetis ĝin kun la celo: disponigi la banejon por la kuracado de mizeraj, sen flegado vegetantaj malsanuloj. Kun granda zorgo kaj oferemo li rekonstruigis la banejon, por poste noblanime donaci la tuton kiel „pia fondaĵo" al ordeno de flegantaj monaĥoj, kiuj senpage kuracis malriĉulojn. Pri la tiama destino de la banejo atestas la tabulo super la ĉefa enirejo: „Por la ne flegita malsanulo konstruita en 1806".

Unu el la plej belaj klasikismaj konstruaĵoj en la lando, la Banejo Császár estis finkonstruita en 1844. En la plua parto de la jarcento ĝi ankoraŭ plu evoluis. En la 60-aj jaroj konstruiĝis „la pompaj naĝejoj virina kaj vira", kaj tiutempe jam ekzistis la modernaj terapioj: ŝlimbanejoj, halo por inhalado, trink-terapioj ktp. En tiu periodo akiris la Banejo Császár la unuan rangon en Budapeŝto. Nur post jardekoj sukcesis la Banejo Lukács transpreni tiun rangon, kiun poste triumfe akiris la banejoj Széchenyi kaj Gellért.

Pli ol jarcenta priskribo (V. Herz) akcentis el inter la avantaĝoj de Császár, ke „kvankam plej konvenas en la someraj monatoj, tamen la ekipaĵo de la Banejo Császár ebligas uzi ĝin ankaŭ

dum la vintra sezono". Same nuntempe ĝi funkcias dum la tuta jaro.

El la dek fontoj de la banejo, ok havas varman akvon: la fontoj Johano, Maria, Antono, Emeriko, Stefano, Turka, Angula (Zúg) kaj Nádor. Ilia meza temperaturo estas 50,5 C°. Du fontoj eligas malvarman akvon: la fonto Amara (Keserű) kaj la Malvarma-puto. La kuracakvoj bone efikas precipe ĉe difektoj de artritoj, neŭralgioj, paraliziĝoj.

En la banejo funkcias la sekcioj de termobanejo, balasta banterapiejo kaj bankuvoj. La okangula baseno de la termobanejo troviĝas sub la kupolo. Aliaj du basenoj havas lokon en anguloj de la domo; la tri basenoj havas akvosurfacon entute 78,7 m². Al ili apartenas seka kaj malseka vaporkameroj, 83 kajutoj kaj ripozejo.

Por balasta terapio oni kreis basenon por piediri en ĝi, kaj alian por resti pendante. Ili kune havas volumenon 82,8 m³ kaj surfacon 58,4 m². Aldoniĝis ankaŭ maseĝejo kaj ejo por „seka streĉado". La 34 bankuvoj estas lokitaj sur la unua kaj la teretaĝo.

La Kuracbanejo Császár apartenas al la Landa Instituto por Reŭmatologio kaj Balneologio, kiu bone zorgas pri tiu grandvalora naturtrezoro de la lando. La rezultoj kompreneble ne estas kalkuleblaj per ciferoj, sed multe pli valoras la nenombrebla aro de la homoj ree saniĝintaj.

Tradukis: E. *Fenyvesi*



Naĝo instruado en la banejo Császár

La Kuracbanejo Császár

130-a datreveno de la naskiĝo de la rumana romantika

POETO

MIHAI EMINESCU (1850-1889)



Okaze de ĉi tiu datreveno, ni prezentas al niaj legantoj du versiojn de unu sama poeziaĵo de Eminescu [eminesku], nome *„Mai am un singur don"*, kies esperantigojn plenumis Kálmán Kalocsay (en „Eterna bukedo", Budapeŝto, 1931, p. 246—247), respektive Jozefo Petrin (nun unuafoje publikigata).

SOLA SOPIR' DE L' SIN'

Sola sopir' de l' sin'
Ke en kvieto granda
La morto trafu min
En loko maro-randa,
Mi sonĝu en trankvil'
Proksime al arbaro
Kaj super vasta maro
Ridetu blua bril'.
Ne volas mi standardon,
Nek estu luksa ĉerk',
El juna branĉ' de kverk'
Pretigu nur brankardon.

Neniu ploru pro la
Mortinto ĉe la kav',
L' aŭtun' susuru sola
En sia velka flav'.
Dum fala riveret'
Enmiksos sian zumon,
La luno verŝu lumon
Tra l' densa branĉo-ret'.
Tintil' — sonoron sendu
Per freŝa vent' la greg',
Min sankta tilieg'
Branĉtreme supertendu.

Ne estos senhejmulo
Mi, ekde tiu hor',
Mi dronos en la lulo
De dolĉa rememor'.
Steletoj de vesper',
Amikoj miaj karaj
Tra l' ombroj foliaraj
Alridos per fajrer'.
Mar-kanto krudmalmola
Ekĝemos de pasi',
Sed polvo estos mi
En mia tomb' izola.

El la rumana: K. **Kalocsay**

DEZIRON HAVAS MI

Deziron havas mi:
Dum bela vespero
Mi mortu tie ĉi
Sur mara randtero.
Mi dormu sen ŝancel'
Ne for de l' arbaro
Sur vasto de l' maro
Serenu la ĉiel'.
Ne estu flagaro
Nek riĉa la tombej',
Nur mia sterna ej'
Plektita branĉaro.

Kaj ploru poste min
Neniu je vertaĵo,
Aŭtune aŭdu sin
La velk' de l' foliaĵo.
Dum fontoj kun brueg'
Senĉese falados,
La luno glitados
Tra pina plejalteg'.
Malvarma venteto
Sonoru super mi,
Vespere de l' tili'
Skuiĝu branĉeto.

Estante sen vagem'
Ekde tiu horo
Mi restos sub prem'
De kara memoro.
El ombroj de la pin'
Stelar' leviĝante,
Amikoj estante,
Ridetos ree min.
Ĝemegos sufero
De l' mara vekantad',
Kaj en la solrestad'
Mi estos nur tero.

El la rumana: J. **Petrin**

Esperanta libroprodukto dum 1979

Kun iom da malfruo, jen nia kutima superrigardo pri la dimensioj de la Esperanta libroeldonado. La baza principo ne ŝanĝiĝis: ni konsideris tiujn librojn, pri kiuj aperis informo dum la jaro 1979 en la rubriko „Laste aperis..." de Esperanto, sendepende de tio, kiun eldonjaron portas la koncerna eldonaĵo.

	1977	1978	1979
Nombro de ĉiuj libroj en kaj pri Esperanto	147	131	160
Suma paĝonombro de tiuj	16 897	14 529	17 407
Nombro de originalaj beletraj verkoj	12	25	14
Suma paĝomobro de tiuj	1 936	3 187	2 530
Nombro de beletraj tradukoj	37	23	38
Nombro de nefikciaj verkoj	62	36	63
Suma paĝonombro de tiuj	6 650	4 685	6 902
Nacilingvaj verkoj pri Esperanto kaj lerniloj	36	32	45
Meza paĝonombro de E-aj libroj	115	114	109
Meza prezo de E-aj libroj (en nederlandaj guldenoj)	9,30	9,06	10,42

Esperantaj libroj aperis entute en 23 landoj. Kiel videble, Hungario okupas la sesan lokon laŭ la nombro de titoloj, kaj la duan laŭ la suma paĝonombro eldonita.

V. Benczik

ORIGINALA POEZIO

Lina Gabrielli

Panjo

Panjo, kial mi ploras
pro la vivo-doloroj?
Mi havas vin,
la donacon
plej belan.
Panjo, via korpo
estas fragila,
eluzita pro jaroj,
sed vi estas roko
al kiu mi alligiĝas,
vi estas plaĝo
al kiu mi albordiĝas,
vi estas suno,
kiu min varmigas
kaj am-vivigas.

Aldo de' Giorgi

PRETERTEMPE

Glitas la tempo for
nehaltigeble,
balzama kiel la vento
forviŝanta
sursablajn spurojn.
L' ekzistforŝvebo
— ĉiama kuracisto —
panslekas vundojn pusajn
kaj vivo renoviĝas memgeneze
eĉ kie blovfrakasis
la uragano.
Surrampas hedero
verdtriumfe
pie kaŝante l'eroditajn brikojn
de enkotitaj nobelaridoj.
Tempodaŭro renaskas
fataltuŝe
l'esperojn forhakitajn,
samkiel voston de lacerto.
En marĉoj haladzaj
aŭ en rokfendoj sterilaj
disventitaj semoj
ĝermas mortospite.
Glitas la tempo for
— maga panaceo ĉionflega —
Sed ĉi enkarnaj
deiamaj rabotoj
freŝsange ruĝas
sencikatriĝe.
Spasmas kaj spasmos
pretertempe
l'infektitaj gangrenoj.
Turmentidente
sin tordas enanime
ĉiu vivelano,
subskue de ĉi damno
enplagiĝinta ĉiuhisten,
pro la foraj, foraj,
traskurĝoj sovaĝaj
de via freneziĝinta
venenita glavo
adulta.

Julius Balbin

DRINK COCA COLA

Trinku
Kokakolon
Trinku
Kokakolon
Trinku
Kokakolon
Trinku
Kokakolon
Trinku
Kokakalon
Trinku
Kokakolon
Trinku
Kokakelon
Trinku
Kokakolon
Trinku
Kokakilon
Trinku
Kokakolon
Trinku
Kokakulon
Trinku
Kokakolon
Ne trinku
akvon
Trinku
Kokakolon
Ne trinku
lakton
Trinku
Kokakolon
Ne trinku
cidron
Trinku
Kokakolon
Ne trinku
vinon
Trinku
Kokakolon
Ne trinku
bieron
Trinku
Kokakolon
Ne trinku
brandon
Trinku
Kokakolon
Ne trinku
vodkon
Trinku
Kokakolon

Trinku
Kokakolon
Trinku
Kokakolon
Trinku
Kokakolon
Trinku
Trinku
Trinku
Trinku
Maltrinku
Trinku
Maltrinku
Trinku
Maltrinku
Trinku
Maltrinku
Trinku
Kokakolon
Kokakalon
Kokakelon
Kokakilon
Kokakulon
Trinku
Kokakolon
Drinku
Kokakolon
Drinku
Kokakolon
Drinku
Kokakolon
Drinku
Nokolakok
Drinku
Kokakolon
Drinku
Kaoklokon
Drinku
Kokakolon
Drinku
Koakkloon
Drinku
Kokakolon
Drinku
Olakaknon
Drinku
Kokakolon
Drinku
Drinku
Drinku
Drinku
Lakloakon

John J. Francis

Tempa rotoro

La jaroj sturmas
eliminante konatojn
kaj trudante fremdon

sulkigante

Ci tie estas mi
kaj tie samtempe

Du nunojn

disigas nur eventoj
grizo kaj velko.

Ariella Colombin

La ruĝo

Vi, ruĝo, la brancojn tuŝas
— nigrajn brakojn de l' vintro —
Vi, ruĝo, varme tinkturas
per via vigleco la mildon.
Al mi, promenanto, ŝajnas
tiu ruĝo esti
la forto de l' vivo donata
al sopiranta volo,
spite tie aganta.
Al la vespero ekvenanta
mi oferas mian senton.
Estas la suna subiro
ruĝa, kiel tagiĝo.

Esperanto- programoj en Hungario dum 1980

06—15/22
BADACSONY
MEZLERNEJA RIPOZTENDARO
O: Junulara Komisiono de HEA
A: Budapest, Pf. 193, H—1368

06—29/07—18
MEZŐTUR
2-a MEZŐTUR-a INTERNACIA ESPERANTA LABORKAMPADO
O: E—Grupo „Baghy Gyula"
A: Mezőtur, Petőfi u. 5. H—5400

07—01/10
SZENTENDRE
INTERNACIA JUNULARA kaj INFANA SKULPTO- kaj PENTROARTISTA TENDARO
O: E—Grupo en Szentendre
A: Megyei Műv. Központ, Szentendre H—2000

07—05/06
DUNAKESZI
FERVOJISTA ESPERANTISTA RENKONTO
O: Fervojista Esperanto-Fakgrupo
A: „József Attila" Műv. Ház Dunakeszi Gyártelep, H—2120

07—06/12
GYULA
18-a SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO
Ö: Konsilantaro de SEU
A: Gyula, 48-as u. 11, H—5700

07—14
BUDAPEST
INTERNACIA VIRINA RENKONTO
O: Virina Komisiono de HEA
A: Budapest, Pf. 193, H—1368

07
ZÁNKA
13-a PIONIRA INTERNACIA TENDARO
O: Teritoria Komitato de HEA
A: Pécs, Pf. 2, H—7601

07—14/20
SZOMBATHELY
2-a RENKONTO de ESPERANTISTAJ FAMILIOJ
O: Ernő CSISZÁR
A: Várpalota, Kulich Gy. u. 25, H—8100

07—14/23
ABALIGET—PÉCS
13-a INTERNACIA RENKONTO NATURAMIKA
O: Teritoria Komitato de HEA
A: Pécs, Pf, 2, H—7601

08—09/23
EGER
SOMERA ESPERANTO-LERNEJO en EGER
O: Departementa Komitato de HEA
A: Eger, Pf. 105, H—3301

09—05/07
KAPOSVÁR — Montaro ZSELIC
5-a AUTUNA MIGRADO
O: E—Grupo „Eĥo de Amikeco"
A: Kaposvár, Irányi D. u. 2., H—7400

1980—12—28/1981—01—02
BUDAPEST
10-a VINTRA ESPERANTISTA FERIO
O: Budapesta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio
A: Budapest, Pf. 153, H—1443

Peto el Leningrado

En nia n-ro 1979/2 aperis artikolo pri Esperanto-teatro en Leningrado. Ĝoje ni anoncas, ke la aktivado tie daŭras. Komence de oktobro 1979 startis kurso, en kiu partoprenis ok junaj geaktoroj, kaj ankaŭ du reĝisoroj, jam sufiĉe konataj por la Leningrada publiko: unu laboras en teatro, la alia ĉe la radio. La geaktoroj estas el diversaj teatroj. Du aktoroj, Oleg Popkov kaj Raŝid Ĥajrulin (ambaŭ el la Teatro de Junaj Spektantoj) kaj instruisto Viktor Goĥŝtejn estas la iniciatintoj de la pligrandigo de la nova Esperanto-teatro. Post la kurso oni komencis intense okupiĝi pri tradukado de elektitaj verkoj en Esperanton, kaj planas prezenti teatraĵetojn kun du-tri geaktoroj. Ili bonvenigas ĉiujn kontaktojn kun geaktoroj-esperantistoj de la mondo, kaj tre volonte ricevas tradukitajn aŭ originale verkitajn teatraĵetojn. Oni povas kontakti la geaktorojn per la adreso de la instruisto: *Viktor Goĥŝtejn, USSR 194 156 Leningrad, ul. Neĵinskaja 4, kv. 113.*

Esperantologia konferenco en GDR

Fine de la pasinta novembro okazis esperantologia konferenco en GDR, proksime al Berlino, en la ripozejo *Bad Saarow*. La temo de la konferenco estis: *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado.* Tiu temo estis aparte interesa kaj aktuala, ĉar dum pri la lingvistikaj aspektoj de Esperanto oni okupiĝas relative multe, la movado, kiu vivigas la lingvon, estas kvazaŭ ne-plugita tereno por la scienco.

La konferencon partoprenis 38 fakuloj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Japanio, Pollando, Rumanio, Sovetio kaj Svedio: ili estis ĉiuj gastoj de Centra Laborrondo de Esperanto. Okazis 25 prelegoj, kiujn sekvis viglaj diskutoj, kion montras la granda nombro de diskutkontribuaĵoj: ili estis pli ol 200! La seminarion konstante partoprenis ankaŭ profesiaj lingvistoj el GDR, kaj ili povis konvinkiĝi pri la perfekta funkcikapablo de Esperanto.

La prelegoj aperos ankaŭ libroforme, sed tio okazos verŝajne nur en 1981.

La GDR-aj esperantistoj meritas apartan dankon pro la teknike perfekta organizado de la seminario, kaj pro la elstare bonaj laborkondiĉoj.

GAJA PAĜO

En nuntempa metropolo:

bonvolu ĉirkaŭrigardi zorgege antaŭ ol trapasi avenuon, kaj poste *prefere ne* trapasu ĝin!

Ankaŭ tie:

— Kelnero! Bonvolu alporti kafon!

— Kian kafon vi deziras? Ĉu nian kutiman, aŭ ian trinkeblan?

De tie reveturinte:

— Kaj en Parizo vi restis *nur du tagojn!?* Malsufiĉe!

— Du tagoj tamen sufiĉis por ni, ni vizitis ĉion. Mia edzino la muzeojn, mia bopatrino la preĝejojn, nia filino la magazenojn kaj mi la striptiz-ejojn. Poste ĉiu raportis pri siaj travivaĵoj.

Ankaŭ reveturante:

— Kiom da mono vi havas? — demandas doganisto ĉarman *junulinon.*

— Bedaŭrinde ne multe, sed ni havas belan familian domon, kaj mi kuiras eminente . . .

Horloĝo ĉe horloĝisto

— Imagu amikino, neforgeseblajn *horojn mi loĝis* ĉe horloĝisto — rakontis la reveninta samideanino.

Ĉu tagloĝo?

Patrino al sia edzo: Suspektinda afero! Nia filino ricevas florojn de sia fianĉo je la Tago de l'patrinoj ! ! !

Jen alia fianĉo:

— Amiko, kial vi aĉetis *liprugon* donace al via fianĉino je ŝia naskotago?

— Ĉar la sola donaco, kion mi poste, parto post parto rericevos!

Sportu! Sportu por modifi vian vivon!

Jam minimuma korpomovo povas modifi vian vivon! Ekzemple *tiu eta promenado* de la pordo ĝis la tablo . . . ĉe la matrikulisto.

Ge-pesimistoj — dum tiu promenadeto:

— Ĉu *ĝuste tiu-ĉi* geedziĝo sukcesos por ni?

E. F.

LEHEL



H60F ***

MASTRUMA FROSTIGUJO

Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR JÁSZBERÉNY

SZILÁRD BÁLINT

La kaptilo

István Csorba, mezaĝa fraŭlo, loĝis sur la 7-a etaĝo de alta ludomo. Li laboris ĉe la urba telefoncentralo posttagmeze de la 14-a ĝis la 22-a horo, tiamaniere li havis liberan tempon en ĉiu antaŭtagmezo. Se la vetero estis bona, li sidis sur benko en la parko kaj legis. Ĉirkaŭ li malgrandaj geknaboj ludis kaj junaj patrinoj ŝovis la infanĉarojn. La ludplaco por infanoj ĉiam estis plena de vigla movado.

En iu tago sur la apuda benko sidis du junaj virinoj, unu el ili jam estis iom konata, ŝi loĝis en la kontraŭa ludomo sur la 6-a etaĝo. Ŝi senhalte plendis al la alia virino:

— Mia edzo frumatene iras labori... poste mi ellitiĝas, matenmanĝas kun la filo, mi faras ordon kaj komencas enui... Se la suno brilas ni iras por promenadi... jam tio estas amuzo, se en la parko mi povas paroli kun aliaj hejmsidaj patrinoj. La ĉiutaga temo estas enua... kiu kion kuiris... kiom dikiĝis la infano... la najbaroj denove kverelis dum la tuta nokto... ĉiam klaĉo kaj klaĉo!

— Vi pravas... — diris la alia virino — se la edzo alvenis hejmen, mi devas rideti, ĉar la edzo estas laca... kaj kolereta... laŭ li la hejma laboro estas nulo... nur la edzo laboras, kaj li postulas la varman vespermanĝon kaj puran ĉemizon...

En tiu momento akre kriis la trijara filo de la unua virino. Li kuradis kun aliaj infanoj kaj dumtempe li terenfalis kaj batis, sian frunton, el la vundo malrapide likadis sango. Csorba eksaltis, levis la knabon kaj per pura poŝtuko bandaĝis la kapon de la infano. Li prenis la infanon en siajn brakojn, kaj diris al la ektiminta virino:

— Sinjorino... venu tuj kun mi!

Ili kune rapidis al la kuracisto, kiu kunkudris la vundon.

— Ĉio estas en bona ordo... post du tagoj bonvolu denove veni al mi kun Sigmundo... aŭ vi, aŭ via kara edzo... — montris la kuracisto al s-ro Csorba. La patrino kaj la viro rigardis unu la alian, sed ne protestis.

La viro prenis la malgrandan Sigmundon kaj ili kune iris al la loĝejo de la juna patrino. En la lifto la viro sin prezentis kaj la virino diris nur sian knabinnomon: „Amalia".

En la ĉambro la virino metis la infanon sur la liton kaj ŝanĝis veston. La viro sidis dorse al la virino, sed en la granda spegulo li vidis ĉion.

— Ĉu vi volas trinki nigran kafon? — demandis Amalia kaj irante butonumis al si la veston.

— Ho, mi dankas...

La malgranda infano profunde dormis sur la lito kaj la viro estis konfuzita.

— Restu trankvile... mia edzo nur malfrue venos hejmen...

— Mi petas pardonon... sed mi devas iri por labori! — kapsignis adiaŭon la viro.

— Ho, mi dankas ĉion! — diris Amalia kun trompiĝo post la foriranta viro.

Postan matenon, kiam Csorba malfermis la fenestron, en la kontraŭa fenestro sur la 6-a etaĝo Amalia mansignis al li. La viro resignis. La suno lumigis la ĉambron de la virino, kiu duonvestite iradis en la loĝejo. Poste akre sonis la telefono:

— Kara István... venu tuj al ni, ĉar mia filo volas vidi vin...

— Kial vi ne venas al la parko?

— Mi ne volas kaŭzi klaĉon... mia edzo estas ege ĵaluza pri mi...

Kiam s-ro Csorba eniris la antaŭĉambron, Amalia ĉirkaŭfermis la kolon de la viro kaj donis kison al li, kiam ŝi transprenis la surtuton de la viro, ŝi ion kontrabandis en la poŝon de la vesto, poste kvazaŭ estus okazinta nenio diris al la malgranda Sigmundo:

— Mia kara... donu kison al la oĉjo... morgaŭ li kunportos vin al la doktoro...

La infano obeis, li estis jam gaja, sub la blanka bandaĝo per viglaj okuloj rigardis la viron. Poste li komencis ludi sur la tapiŝo, absolute ne ĝenis lin la ĉeesto de fremda viro. Amalia verŝis konjakon kaj proponis cigaredon al Csorba, ŝia negliĝo estis malfermita, sub ĝi bone estis videbla la koketa banvesto. La viro forte ruĝiĝis kaj interne luktis kontraŭ la tento, vidante la klaran sinproponon, sed regis sin, ekstaris kaj preskaŭ senvorte foriris. Amalia iĝis kolerega.

Vespere je la 18-a en la telefoncentralo la ĉefo vokigis s-ron Csorba. En la ĉambro atendis lin policisto.

— Bonvolu veni kun mi al la policejo!

En la oficejo de polico, la oficiro severe alrigardis lin:

— Kion vi faris kun s-ino Lovász?

— Nenion... mi ne komprenas...

— Antaŭ horo la edzo de tiu sinjorino trovis ŝin en la loĝejo tute nuda kaj alligite al seĝo, ŝi estis ebria preskaŭ senkonscie kaj balbutis pri seksa violento, dirante, ke la viro forportis ŝian mamzonon... Hodiaŭ antaŭtagmeze oni vidis vin, kiam vi forlasis tiun loĝejon. Estas interese, ke la edzo tute ne konas vin!

— Mi faris nenion... vere mi hodiaŭ vizitis la difektitan infanon, kiun mi kun la patrino hieraŭ kunportis al la kuracisto... Antaŭ tiu evento mi ne konis tiun sinjorinon!

— Kial vi vizitis la preskaŭ nekonatan virinon?

— Ĉar ŝi vokis min per telefo-

no, dirante, ke la filo volas vidi min...

— Kial ne renkontiĝis kun ili en la parko, kiam la infano ne estis tre malsana? Post tiu malgranda akcidento hieraŭ posttagmeze la knabo jam ludis en la parko!

— Mi scias pri tio nenion... la sinjorino diris, ke ŝi ne volas kaŭzi klaĉon...

— Ĉu vi faris violenton?

— Tute ne!

— Vi mensogas!

— Mi tute ne mensogas!

— Malplenigu viajn poŝojn! — diris la policoficiro.

Post kelkaj minutoj el la poŝo de la surtuto retroviĝis la rozkolora virina mamzono.

— Konduku lin al la ĉelo, li estas arestita! — diris la oficiro al policisto.

Kara Leganto! La redakcio petas vian helpon por mallonge fini la historion. Ni scivolas: kiel aranĝiĝis la polica afero kaj kio okazis en la loĝejo de geedzoj Lovász? La sendinto de la plej bona solvo ricevos libropremion kaj la teksto aperos en Hungara Vivo.

Ĵus aperis



Paĝo de komencantoj

Infana pilko

Tiu ĉi historio komenciĝis tre interese. Foje Mladen prenis malnovan kajeron, kaj falis el ĝi bildo. Li prenis la bildon kaj rigardis ĝin.

Sur la bildo estis li, kiel 10—12-jara knabo kun nigraj okuletoj, helaj haroj kaj ruĝa pilko en la manoj. Mladen jam ne memoris, kiu kaj kiam faris tiun bildon. Li volis remeti ĝin inter la flavajn paĝojn de la kajero, kiam la bildo kvazaŭ moviĝis, kaj la knabo kun la pilko gaje ekridetis al Mladen.

Unue Mladen ne volis kredi al siaj okuloj, sed la knabo amike salutis lin:

— Saluton.

Mladen ne komprenis, kiu parolis tiun vorton, kaj li atente trarigardis la ĉambron, sed ĉiuj mebloj estis sur sia loko, kaj nur li sola estis en la ĉambro.

— Saluton, mi estas — aŭdis Mladen denove la parolon de iu. — Mi estas, la knabo sur la bildo.

Mladen pli atente rigardis la bildon, kaj maltrankvile rimarkis, ke la knabo kun nigraj okuletoj ne nur ridetas, sed ankaŭ parolas.

— Jes, mi estas. Kiel vi fartas?

— Dankon, bone — senvole respondis Mladen.

— Mi ne kredas, ke vi fartas bone — diris la knabo. — Ĉar sufiĉe maljuna vi ŝajnas, kaj ankaŭ malgaja. Kaj vi havas malmultajn harojn.

„Kion parolas tiu ĉi knabo?" — demandis sin mem Mladen, sed li diris nenion.

— Ĉu vi estas direktoro? — demandis la knabo.

— Ne — finfine respondis Mladen. — Mi ne estas direktoro, mi estas oficisto en la poŝtoficejo.

— Ha, ha oficisto en la poŝtoficejo — kare ekridis la knabo.

— Jes! Kial vi ridas? — demandis Mladen, sed la knabo kvazaŭ ne aŭdis lian demandon.

— Ha, ha oficisto. Kaj ĉu plaĉas al vi tiu ĉi ofico?

— Jes, kompreneble! La ĉefoj ŝatas min. Mi ricevas sufiĉan monon. Mi havas loĝejon, ĝardenon kaj aŭtomobilon.

— Ha, ha, sed vi ne havas pilkon — diris la knabo.

— Kial mi devus havi pilkon? Mi jam ne estas 10-jara knabo. Mi estas plenkreska viro.

— Vidu, vi diras, ke vi estas plenkreska viro. Jes, tio vi estas. Sed vi estas nur oficisto, kaj kiam vi estis infano, kaj vi ne havis loĝejon, ĝardenon kaj aŭtomobilon, nur pilkon — tiam vi deziris fariĝi maristo. Vi deziris veturi tra la maroj, vi deziris vidi nekonatajn landojn.

— Kion vi parolas! Nun mi ne havas tempon veturi. Mi devas okupiĝi pri miaj aŭtomobilo kaj ĝardeno.

— Sed vi ne havas pilkon, kaj vere vi estas tre malĝoja, ĉar kiam vi havis pilkon, vi ne pensis pri aŭtomobilo kaj ĝardeno. Vi pensis pri malproksimaj kaj belegaj landoj, kaj vi estis ĝoja. Mi devas donaci al vi mian pilkon, kara sinjoro poŝtoficisto — diris la knabo, kaj lia gaja rideto malaperis.

Mladen maltrankvile rigardis ĉirkaŭ si. Li estis sola en la granda kaj silenta ĉambro kun la malnova flava bildo en la mano. Ĉu tio estis veraĵo aŭ sorĉo?

En tiu ĉi nokto Mladen dormis iom maltrankvile. Dum la dormo li vidis grandan blankan ŝipon, kiu veturis sur la maro, kaj li sidis feliĉe en la ŝipo. La ŝipo veturis al nekonataj, malproksimaj, belegaj landoj, kaj nek la ĉefoj de la poŝtoficejo, nek la aŭtomobilo kaj la ĝardeno povis haltigi ĝin.

Matene je la 6-a horo la horloĝo finis la belan vojaĝon. Mladen-on atendis la poŝtoficejo.

Sed vespere, post la laboro, li aĉetis por si belan, ruĝan pilkon, kaj hejme denove elprenis la flavan bildon el la malnova kajero.

Georgi **Mihalkov**

Por Esperanto dum la tuta vivo

Teo Jung: Ĉiu ĉiun. Memuaro. Eldonis: TK-Stafeto, Antverpeno—La Laguna, 1979. 400 p., 21 cm. Prezo: 36, — ned. gld. (Por Hungario 400,— forintoj.)

Pri la historio de la Esperanto-movado postrestas ordinare tre malmultaj dokumentoj. Kompreneble,

recenzoj recenzoj recenzo

ne malabundas rezolucioj, interkonsentoj, direktivoj ktp. (kvankam ankaŭ tiuj multnombre perdiĝis kaj daŭre perdiĝas por ĉiam), sed dokumentoj pri la onidire grizaj sed fakte riĉe ŝvelaj ĉiutagoj, kiuj estis la mortero de tiu multrilate impona konstruaĵo, kiun ni nun loĝas.

Memuaroj de elstaraj figuroj estas ŝatataj ankaŭ en la nacilingvaj kulturoj, ĉar la legantoj havas la senton, ke per tiaj verkoj oni atingas senperan kontakton kun pli fruaj epokoj, Tiom pli ekscitas la imagon apero de ampleksa memuaro el la plumo de elstara esperantista aktivulo, kiel Teo Jung, fondinto kaj dum kvar jardekoj redaktoro kaj eldonanto de la gazeto *Heroldo de Esperanto.*

Eble tiuj specialaj cirkonstancoj kaŭzas, ke *Ĉiu ĉiun* ne plene kontentigas min. Volonte mi legus en ĝi pli pri eventoj, kiuj rekte ligiĝas al la historio de la internacia E-movado, pri la veraj ĉiutagoj de la redakta laboro, kaj ankaŭ pri la konkreta rolo de *Heroldo* en iuj krizaj aŭ inverse, triumfaj momentoj de la movado. Kaj mi kontentiĝus pri malpli detala prezento de la privata vivo de Jung, pri liaj amoj kaj detaloj de liaj negocaj aferoj.

Sed verŝajne mi estas maljusta al li. Jung estas homo ekstreme interesa kaj admirinda. Li sukcesis antaŭ kvindeko da jaroj pri io tia, pri kio lastatempe vane oni klopodis: aperigo de Esperanta semajnrevuo. Kial li sukcesis tiam? Kaj kial oni ne sukcesis nun? Oni povus vicigi multajn argumentojn pri malsamaj cirkonstancoj, sed tre verŝajne le ĉefa kaŭzo kuŝas en lia mania decidigin-teco kaj unika laborkapablo. Nur unu indiko pri tio: Jung, kvankam li estis fumanto, decidis *neniam fumi* dum skribado, verkado, korespondado ktp., ĉar cigaredo interfingre malrapidigus lian laborritmon. Tiu streĉa laborritmo — pri kiu atestas interalie 1330 numeroj de *Heroldo* — probable estas la plej bona recepto por longa vivo: li naskiĝis en 1892, kaj 87-jara, li verkis 400-paĝan libron ...

Tiu ĉi libro kondukas nin tra longa kaj riĉa vivo. La junaĝo de Jung disvolviĝas en la relative paca medio antaŭ la unua mondmilito, por lia matura viraĝo servas kiel fono la intermilita Eŭropo, kaj kiel maljunulo li vivas la vivon de la postmilita epoko, kiun ŝajne li ne povis plene kompreni — sed ĉu ni ĉiuj certas, ke ni komprenas ĝin?

La plej interesaj paĝoj de la verko estas tiuj, sur kiuj li priskribas kune kun sia vivo ankaŭ tiun de la gazeto kaj eldonejo *Heroldo de Esperanto.* Oni povas ekscii interesajn detalojn, ekz. pri la *Jarmiloj pasas* de la maldiligenta profesoro *Haefker,* pri la furora sukceso de *En Okcidento nenio nova,* pri la cirkonstancoj de *Landoj de l' Fantazio* (utopia romano de Teo Jung), aŭ pri la premaj jaroj de la nacisocialisma regado en Germanio, kaj la malfacilaĵoj de lia ekloĝo en Nederlando.

Jung estas verŝajne tiu homo, kiu en la historio de nia movado dediĉis la plej multajn laborhorojn al Esperanta agado. Liaj spertoj do estas unike riĉaj, kaj el tiu trezorejo povas kaj devas ĉerpi ĉiuj, kiuj en iu ajn tereno de la movado daŭrigas la laboron, kiun li plenumis honeste kaj sindediĉe dum longaj jardekoj.

Eble menciindas, ke Jung uzas Esperanton klasikan, puran, liberan de neologismoj. Lia sintakso ankaŭ surprizas per klareco, simpleco. Sen ia troigo mi povas do emfaze konsili ankaŭ al *ne tre spertaj* esperantistoj kuraĝe alfronti la legadon de tiu ĉi dika volumo.

V. *Benczik*

Ĉio en unu volumo

GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO. Historio, literaturo, metodiko. Red. A. Pechan. Eld. HEA, Budapest 1979 370 p. 19 cm. Prezo: 15, —gld.

Jam la unua eldono de tiu ĉi studlibro, aperinta antaŭ pli ol jardeko kun granda eldonkvanto, elĉerpiĝis dum malmultaj jaroj, kaj oni sentis mankon de simila konsultilo en la tuta mondo. Ĝi reaperis en formo tralaborita kaj kompletigita. La reeminentaj kunlaborantoj grave ĝisdaktoro Alfonso *Pechan* kun stabo de datigis kaj perfektigis la verkon. Gravan kompletigon prezentas apero de *Metodiko* en la sama volumo, poste literaturhistoria parto, kiun kompletigas aparta volumo sub titolo *Baza Literatura Krestomatio.*

La mondhistoria ĉapitro kun 31 subĉapitroj ampleksas 121, la literaturhistoria kun 26 subĉapitroj 154 paĝojn, kaj metodiko 58. Kiel konsultlibro la „Gvidlibro" devus troviĝi en la hejmo de ĉiu E-aktivulo, kaj kiel ekzamena materialo ĉe ĉiu lingvoinstruisto. Por iuj partoj kiujn la aŭtoroj nomis „skizo" la leganto trovas bibliografion kiu ebligas kompletigi la konojn pri tiuj temoj.

Estas prezentita ankaŭ la historia trarigardo de antaŭuloj de Esperanto kaj postaj kaj nunaj konkurantoj, ĉar ankaŭ tio estas sciinda. Iuj partoj (ekz. pri forgesitaj planlingvoj), kompreneble, ne estas postulaĵo de E-ekzameno, sed servas kiel interesa legaĵo. La samo validas por literaturhistoria skizo (kunmetita de K. Kalocsay) kie oni ne postulos detalan konon de ĉiu verkisto kaj verko, sed

V
DAŬRIGO

de la historio LA DOLĈA NUPTO aperinta en la n-ro 1979/3.

Ĝia aŭtoro estas Fritz Hagemann (DDR—9443 RASCHAU, Bergstr. 14). La libropremion ni sendis al li per poŝto.

... Deprimita kaj maltrankvila pro la sorto de sia edzino, Johano reiris al la urbo. La du azenojn li kondukis per ŝnuregoj. Li ne rimarkis, ke en sufiĉa distanco sekvis lin policisto.

Kiam li estis redoninta la azenojn al la pruntedoninto, la polico staris antaŭ li kaj ordonis al Johano iri kun li al la policejo.

Alveninte tie, li vidis en la malpura antaŭĉambro Annan, kiu plorante sidis en malhela angulo sur eluzita seĝo. Johano volis ŝin saluti, sed la policisto ne permesis tion, sed premis ilin en ĉambregon, kie sidis la ĉefpolicisto, viro dika kun hirtaj lipharoj kaj severa rigardo. Per bruskaj vortoj li ordonis al Johano raporti, pro kio Anna kaj li estis arestitaj. Policistino tajpis protokolon. Johano rakontis ĉiuj okazintaĵojn post la geedziĝo, ĝis la aresto. Li ankaŭ pruvis, ke Anna ne estas malĉastulino, sed lia edzino. Post ĉi tiu klarigo la vizaĝo de la ĉefpolicisto iom heliĝis, kaj lia parolmaniero fariĝis iom malpli severa, ĉar la raporto de Johano akordis kun la eldiroj de Anna. Nun oni alkondukis Annan. La ĉefpolicisto anoncis, ke dum la nokto ili devos resti en la policejo, kaj matene aperi antaŭ la juĝisto. Sed ĉar estas dokumentite, ke ili estas geedzoj, ili devos pasigi la nokton en la sama ĉelo. Policisto kondukis ilin tien, donis al ili malabundan vespermanĝon, kaj ŝlosis la pordon.

Anna kaj Johano sidis flanko ĉe flanko, kaj Johano klopodis trankviligi ŝin. Post iom da tempo li sukcesis pri tio, kaj ŝi eĉ manĝis iom el la kaptiteja supo. Post kiam la lumo estis estingita, ili demetis la survestojn kaj kuŝis sur la tabullito. Ĉar ĝi estis mallarĝa, ili devis kuŝi tute proksime unu al la alia. La intertuŝado de la korpoj vekis la viv- kaj amsopirojn. Ili karesis kaj kisis unu la alian, kaj povis fine ĉi tie, sub polica protekto festi sian nuptonokton.

Matene ili aperis antaŭ la juĝisto. Post kiam tiu estis leginta la protokolojn, li liberigis la junajn geedzojn.

nur de plej gravaj fazoj, skoloj, verkoj, nomoj.

Por mi persone kiel E-historiisto plej interesa estas la petitltera 33-paĝa teksto pri E-movado en Hungario, kaj tiuj ĉapitretoj certe ne estas ekzamena postulaĵo por aliIandaj ekzamenatoj. Post apero de tiu ĉi valora kaj nemultekosta studlibro, mi esperas, ke ambiciaj fuŝuloj en iuj landoj ĉesos kompili kaj vendadi por bezono de seminarioj kaj ekzamenoj maltaŭgajn, malbonkvalitajn kaj senvalorajn kelkpaĝajn „kompendiojn" multobligitajn kun la preteksto „Ni ne havas...". Nun ni havas bonegan helpilon kun formato plej taŭga, ŝika kovrilo kaj tipografio.

Se oni volus harsplitadi, oni povus trovi mankojn ankaŭ en ĉi tie prezentita verko, kiel cetere en ĉiu alia tiukampa. Ekz. en la aŭtora indekso mi ne trovas la nomojn de Deguĉi, Dekker, Demidjuk, Egerrup, krome de Mallia, Samyn, Sola, Tvarozek, cetere premigajnintoj de Belartaj Konkursoj, prezentitaj en aparta volumo de la sama eldonisto.

Ni povas nur gratuli al la redaktoro, liaj kunlaborantoj kaj al la eldonisto, Hungara Esperanto-Asocio, kiu plu portas la torĉon de antaŭmilita Literatura Mondo kaj ĉiumonate regalas siajn legantojn per nova titolo.

Marinko *Ĝivoje*

Ses romanoj — en unu volumo

Libro de romanoj, de Vilmos Benczik. Hungara Esperanto-Asocio, 1979. 19 cm., 229 p. Prezo: 15,— gld.

La unua originala romano en Esperanto, *Kastelo de Prelongo* de H. Vallienne, aperis antaŭ 72 jaroj, kaj ĝi estis, minimume, granda fortostreĉo, sur pli ol 500 presitaj paĝoj. Kiam oni riproĉis al la aŭtoro, ke li pli bone farus propagandante la lingvon, li respondadis, „Certe antaŭ ĉio ni devas konigi la utilecon praktikan de Esperanto, sed ĝi nur tiam triumfos kaj venkos, kiam ĝi estos literatura!" Kaj en la posta jaro, 1908, aperis lia dua originala romano samlonga, *Ĉu li?* Tio estis grava mejloŝtono de Esperanto, evidente: la unuaj serioze taksindaj ampleksaj fikciaĵoj en la internacia lingvo. La fakto ke, enhave, ili apartenas al la fako de felietonaj sensaciaĵoj ne povas senvalorigi ilin en la historia kunteksto de la lingvo: facilaj distraj legaĵoj tiam, ne malpli ol nun, estis agrabla furaĝo por nespecialistoj. Ja ne mankas okazaĵoj, ja ne mankas intrigoj, kaj se ili estas pli kuriozaj ol realecaj, nu, ankaŭ tio rilatas al certaj gustoj de tiu epoko. Ankaŭ lingve la verkoj havas kelkajn agrablajn trajtojn. Tute senriproĉa la lingvaĵo ja ne estas, sed ŝajnas al mi, ke la fortaj kritikoj de Kalocsay kaj Waringhien ĉirkaŭ 1933, kiuj kulminis en tio, ke Kalocsay lingve „reviziis", resp. reverkis, la tutan *Ĉu li?*, originis ĉefe el la fakto, ke la stilo de Vallienne ja ne estis la glate matura „moderna" stilo de Literatura Mondo. El hodiaŭa vidpunkto la lingvaĵo de Vallienne povas efiki kiel pli taŭga por la rakonto oI la mondumeca memkonscio de la kaloĉaja.

Ĝi cetere dividas kun la lingvaĵo de nia dua romanverkinto, H. A. Luyken, alian agrablan trajton. Nome, la uzita vortprovizo ofte liveras al ni belajn vortojn kaj esprimojn hodiaŭ ne plu uzatajn, kiuj tamen havigas al la lingvo riĉan sinonimaron. Ekz-e, kie hodiaŭ oni skribus verajne *kaptilo*, Luyken uzas *enfalejo*, kiu en la kunteksto estas nepre pli trafa, pli preciza, kaj pli pitoreska. Apud la hodiaŭa *koŝmaro*, kaj hieraŭa *inkubsonĝo/inkubo*, oni disponas pri la praa *premsonĝo*. Oni *enkestigas siajn apartenaĵojn*, ktp. Tia stilo povas veki nostalgion, sed ĝia studado certe multe utilus al la modernuloj.

Luyken verkis kvar longajn romanojn: *Paŭlo Debenham* (1912); *Mirinda amo* (1913); *Stranga heredaĵo* (1922); *Pro Iŝtar* (1924). Esence, ili estas apenaŭ pli realecaj ol tiuj de Vallienne, ĉar la intrigoj estas neverŝajnaj kaj la rolantoj estas kartonecaj. Sed ili same kaptas la atenton de la leganto, kaj plaĉas se oni kapablas toleri eksmodajn artformojn.

Parenteze, Esperanto mem ekaperas en du-tri el ĉi tiuj fruaj romanoj. Ĉe Vallienne, ekzemple, ĝemeloj nedistingeblaj (eĉ de la edzinoj!) „elektis eksteran signon, kiu ebligis ilian malsimiligon. Tial ke ambaŭ estis fervoraj Esperantistoj, ili kompreneble portis en sia butontruo la verdan stelon de l'Espero, la insignon de la nova lingvo. Sed dum Fernando ĝin portis dekstre, Petro ĝin alkroĉis maldekstre: kaj tio sufiĉis, por ke ĉia ajn necerteco estu neebla". Hm...

Tute klare la verkoj de Vallienne kaj Luyken estas gravaj en la kunteksto de nia movado kaj kulturo, kaj pli-malpli seriozaj studantoj devus koni ilin. Nu, la problemo ĉiam estis trovi ekzemplerojn. Preskaŭ certe neniu hodiaŭa eldonisto volus reeldoni tiajn ampleksajn verkojn kun relative malgranda altirpovo. Kion fari? Nu, feliĉe Vilmos Benczik havis la brilan ideon kompili tiun ĉi volumon *Libro de romanoj*. En ĝi li plendetale rerakontas la tutajn temfadenojn de la ses romanoj kaj por ĉiu inkluzivas longajn karakterizajn ĉerpaĵojn el la originalaj tekstoj (en la kazo de *Ĉu li?* eĉ komparan ĉerpaĵon el la kaloĉaja revizio, same netrovebla aliloke). Tiamaniere ĉiu esperantisto, kiu ne povas trovi la originalajn volumojn (kaj tio estas la plimulto el ni) havas jom eblecon vere konatiĝi kun ĉi tiuj ses gravaj fruaj verkoj de nia literaturo. Benczik meritas nian sinceran gratulon.

W. Auld

Moderna poezio el Usono

STEVENS, Wallace: Ferio en realo. El la angla tradukis Kris Long kaj Humphrey Tonkin. Eldonis Kris Long, Bracknell, Berks. Britio, 1979. 96p., 16 cm.

Nova volumo riĉigis la esperantigitajn verkojn de la usona literaturo, kaj ĝi tutcerte donos neĉiutagan plezuron al la amantoj kaj komprenantoj de la intelekta poezio.

Kris Long eldonis ĉi tiun, el la libroprodukta vidpunkto ne, sed enhave tre pretendeman poem-selekton, tiel memorante pri la 100a naskiĝjubileo de Wallace Stevens (1879—1955), kies nomo ŝajnas esti ne tro konata eĉ en la rondoj de la mondliteratur-leganta publiko. Ties kaŭzo plej verŝajne estas la troa abstrakteco de liaj pensoj, la delikatsenta profundeco de lia vidmaniero. Liaj poemoj estas malfacile alireblaj, ilia kompleta kompreno bezonas trasenteman kapablon kaj sufiĉe profundan instruitecon pri la moderna poeta esprim-maniero.

Wallace Stevens estis eksterulo, amatora poeto: li ne estas lokumebla en iun ĉefan tendencon de la usona poezio. Ni povas nomi lin „poeta doctus", aŭ „poeto de poezio", kiu opinias, ke poezio estas abstraktigo, do metodo de ekkono, kun utila kaj delekta funkcioj. Impresioniste li ekkaptas la nuancojn de la ekstera mondo, kaj konstruas el ili internan, profunde filozofian unuecon.

Ni sentas, ke le tradukistoj, koncentrante al la enhava fideleco (unu poemo estis tradukita de H. Tonkin, la aliaj de Kris Long), ne sukcesis redoni la originalan ritmon kaj muzikon de la poemoj. Tamen ili meritas honoron por la fortostreĉo traduki la tre malfacilan lingvaĵon kaj por la bona selektado. Ili donas altnivelan legaĵon en la manojn de nia esperantista legantaro. Ĉu ĝi estos legata kaj komprenata?

Ildikó *Király*

Vin atendas

Dunakanyar (Danubokurbiĝo)
Cegléd
Vác
Nagykőrös
Százhalombatta
Érd
Monor
Zebegény
Szob
Szentendre

STELOJ DE EGER

Certe Vi scivolas, kio okazis al la ĉarma Eva kaj ŝia akompananto en la kamero de la mortintoj . . .

Vi povas ekscii tion, aĉetante la bildrakonton Steloj de Eger, kiu estas adaptaĵo de klasika hungara romano, rakontanta atentoĉene pri la kontraŭturka rezistado de la hungaroj en la nordhungarlanda urbo Eger, dum la 16-a jarcento.

La teknike luksa bildrakonto — aparte taŭga por komencantoj — aĉeteblas ĉe ĉiuj libroservoj. Esperantistoj en socialismaj landoj povas mendi ĝin ĉe sia landa asocio, hungara kulturcentro en sia lando, aŭ per librovendejoj, kiuj okupiĝas pri perado de eksterlandaj libroj. Jen, la bibliografiaj indikoj de la libro:

Géza Gárdonyi: Steloj de Eger. 64 p., 24 cm. Kun koloraj kovriloj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1979. ISBN 963 571 054 2 Prezo: 6,— ned. gld. aŭ ekvivalento. (Por socialismaj landoj 18,— forintoj aŭ ekvivalento.)

LETERKESTO

Nia redakcio ricevis plurajn leterojn de legantoj informantaj nin pri diversaj — ĝenerale agrablaj — travivaĵoj okaze de pluraj internaciaj E-renkontoj. Feliĉe kreskas la nombro kaj la partoprenantaro de tiuj publikaj renkontoj, tiom gravaj por nia movado. Manke de loko ni mencias sube nur kelkajn:

S-ino *B. Cheverry,* Angers, F.: La fama Kulturdomo de *Grésillon,* kaj ties variaj, altinteresaj programoj por admirinde vasta esperantista publiko, ankaŭ nin igis diri ofte: *bravege!* Oni flegas tie sukcese kaj bonrezulte E-an kulturon, kaj tion montras ankaŭ via „konstanta, plezura legado" kaj taksadoj al nia revuo. La artikolo *„Hej fervojo..."* (1978/4.), pri „pionirfervojo" en Budapeŝto, vekis tre agrablajn memorojn por vi (tion skribis multaj legantoj): vera plezuro por redaktoroj, pro kio ni samideane dankas!

S-ino *Halina Ziotkowska,* Varsovio, Pl.: La pasintaŭtuna Int. Esperantista Feriado en *Miedzygorze* — vi informas —, tiu ĉarma ripozloko montara, prezentis veran familian etoson por esperantistoj el dekkvar landoj. Krom diversaj kursoj kaj seminarioj, ankaŭ piedekskursoj al montpintoj, aŭtobus-ekskursoj tra la regiono kaj artaj programoj, vesperaj plezuroj faris la kuneston tre riĉa, sentoplena.

S-ino *Janet Enghardt,* Farsta, Svedio: Priskribante, vian agrablan partoprenon en la 2-a IMEK en Hódmezővásárhely, vi forte dankas al la organizantoj, kaj aparte al s-ano L. *Kapitány,* kiu samideane prenis sur sin la taskon, gvidante vin tra la nekonata hungara ĉefurbo, ekde via aviadila alveno ĝis la medicina konferencejo en la provinca urbo, ankaŭ dum via reveturo. Ni klare komprenas vian dankemon, ja tiel kaŭzis via longa veturo ĝojplenan memoron. Se ni estas sinceraj, ni devas diri ankaŭ tion, ke samkiel nia eminenta amiko, tre multaj hungaraj — en aliaj landoj tieaj — *esperantistoj sindone* kutimas fari similajn helpojn: tion diktas kaj la internaciisma, kaj la patriota konscienco. Tiel agis ankaŭ nia amiko, kapable, kaj ni kun li kore dankas, ke vi juĝis tion memorinda.

Teodoro Lőwenkopf, Maagan (Valo de Jordano), Israelo: Kiel nia abonanto jam de multaj jaroj, vi certe rimarkis en la lasta tempo nian „regulan" malregulecon pri aperoj. Tiutempe ni vane esperis ree firmiĝon de la aperdato (tial vi trovis limdaton apud enigmo), sekve nia redakcio petas de la abonantoj *amikan indulgon!* Finfine bone, ke vi ricevis je la 1-an de novembro la nron 79/3, do baldaŭ post ĝia apero, kio bedaŭrinde prokrastiĝis ĝis oktobro. Poste ni jam evitis publiki limdaton por solvoj —, memkompreneble *ĉiu ĝusta solvo* partoprenis lotumadon, sendepende de la alven-dato.

Oskar Stolberg, Leipzig, GDR: Via interesa informo, ke vi povas aĉeti H. V. ĉe la ĉefa stacidomo, — do probable ankaŭ aliloke en GDR ĉe gazetvendejoj — montras la *respekton* de gazet-entrepreno al Esperantlingva magazeno, kaj tial ĝi estas signifplena! Tiun rezulton helpis atingi la *ripetiĝantaj mendoj* kaj instigoj de la esperantistaj aĉetontoj (oni vendas prefere tion, kion publiko postulas), kaj la moderna, serioza *aspekto* de nia kolora revuo. *Vi agis* aktive kaj favore al nia afero, kiam vi kaj viaj aliaj laborgrupanoj perletere instigis la Hungaran Kulturcentron en Berlino vendi kaj liveri *librojn de HEA.*

Anastas Todorov, Sofio, B. G.: La supra respondo koncernas ankaŭ vian demandon: centra interkonsento malrapide glitas foje al foraj punktoj. La Hungara Kulturcentro en Sofio tiam prenos serioze disvastigon de HEA-eldonaĵoj, se vi, karaj bulgaraj amikoj, ripetante kaj insiste stimulos kaj mendos! Nevidante eventuale intereson de pukliko, la afergvidantoj apenaŭ volonte prenos sur sin ŝarĝon — vi certe konsentos pri tio, ĉu ne? — Novelojn kaj aliajn kontribuaĵojn, se originale E-lingvaj, ni akceptas volonte, kompreneble depende de ilia nivelo kaj adaptiĝo al la redaktado de HV, sed tradukaĵojn laŭeble ni evitas. — Rilate al enŝteliĝintaj neoficialaj vortoj, ni petas pardonon! Restis bedaŭrinde sen klariga gloso: *„ŝriki"* = eligi penetran, altan krion; *„stentori"* = fortege krii, kiel iam *Stentor,* heroo de Iliado; *„joviala"* signifas profunde gajan, bonhumoran konduton, kian havis ofte Jupitero (= Jovo). La du lastaj estas ververe fremdvortoj, troveblaj en nacilingvaj vortaroj pri fremdvortoj kaj en leksikonoj. Ni esperas, ke la erare ne-glositaj vortoj plej ofte estas kompreneblaj helpe de la kunteksto.

Pastro *Giacomo Jacobitti,* Roma, Radio Vatikana: Dankon pro viaj laŭdesprimoj pri nia numero 1979/3. Via Esperanto-Redakcio, firmiganta sian lokon *la* lokon *de Esperanto* inter la aliaj lingvoj naciaj, plenumas honorinde sian postenon por la afero de la Internacia Lingvo. Koran saluton!

Jerzy Banacki, PL 97—200 Tomaszov Maz. Pollando. Dumitrasku Silvia, Constanta, Rumanio. Virginia Popova, Sofio, Bulgario. El inter la multaj solvoj, kiuj konkursis por daŭrigi la nefinitan noveleton, viaj klopodoj estis la plej bonaj. Tamen la redakcio povas akcepti nur unu solvon pri la „Dolĉa nupto": per la helpo de lotado naskiĝis la rezulto. Ni gratulas vin kaj petas ankaŭ en la venonto partopreni en tiu konkurso.

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Cefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H—1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,— al eksterlando por unu jaro 78,— forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. — 80. — 173 — Nyírségi Nyomda Responda gvidanto: Zoltán Jáger, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

Dum ekskurso, ĉe sporto,

en teo, en limonado

MIKÖV

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1725 Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefono: 476-716, 573-088

ETERNE MODA,
ETERNE VALORA ESTAS
LA GOBLENO
Hungarocoop Budapest